

1979 septembro

72-a jaro

n-ro 885 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Vi trovos

plurajn promesojn, ke ni en la venontaj revunumeroj revenos al diversaj aspektoj de la Kongreso en Lucerno. Ĉiuseptembre ni faras tiajn promesojn. Vi poste eventuale rimarkas, ke ni kvazaŭ forgesas tiujn malrektajn pardonpe-tojn pri la neeblo en dudek paĝoj resumi la tutan kolosecon de niaj Kongre-soj. Tamen, ni ja revenas al niaj promesoj. Tio okazas iel implicite, interlinie. Pensu ekzemple pri la nova Statuto traktita en Lucerno. Ni (kaj vi) revena-dos al ĝi dum la venontaj jardekoj, kaj ne sole en la venontaj revunumeroj. Al unu aspekto de la 64a UK ni prefere ne revenu: Ĝi estis preskaŭ perfekta el la organiza vidpunkto. Ĝi estis maksimumo atingebla surbaze de niaj ĝis nun validaj konceptoj pri la Universalaj Kongresoj. Kiam oni atingas tiun per-fektecon, necesas ŝanĝi la koncepton aŭ almenaŭ serioze konsideri tiun eble-con. Ĉu do oni bonvolus iom okupiĝi pri tiuj konceptoj kaj konsideroj? Pretere dirite, "oni" ĉi tie ne signifas nur la Estraro, estrarano pri kongresoj, venontjara LKK kaj simile; ĝi signifas ankaŭ vi, kiu legas ĉi tiujn liniojn, kiu estis aŭ estos kongresano.

Enhavo

- 141 Solena Inaŭguro de la 64a Universala Kongreso de Esperanto: Gastoj aklamas nian agadon (sm)
- 143 Parolado de Robert Muller, sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj: La mondo bezonas vin
- 146 Kongresa rezolucio
- 147 Malferma solenaĵo: Parado de landaj asocioj
- 148 La Komitato kaj Estraro de UEA: Longe, sed efike
- 149 Nova statuto de UEA: 141 voĉdonoj pri 60 artikoloj (Victor Sadler)
Novaj honoraj membroj de UEA: Emilija Lapenna kaj Hideo Shinoda
- 151 Internacia Somera Universitato: Dek unu prelegoj en kvar tagoj (Boris Kolker)
- 152 CED kaj esperantologio: Por pli aktiva kunordiga rolo (sm)
- 153 Belartaj Konkursoj de UEA 1979: Rezultoj
Originala poezio; Unua premio: Omaĝe al Blaise Cendrars 1913 (Eva Tófalvi)
- 154 Ĝeneralaj kunsidoj: Bone kaj novstile
Kelklinie pri . . . (mallongaj notoj pri aliaj kongresaj programeroj)
- 155 Solena Fermo: Trofeo por belgoj
- 156 Artaj aranĝoj: Riĉo kaj ĝiaj malvirtoj (Hill/Masterman/Milojević)
Originala poezio; Tria premio: Laŭ simpla tono (Mauro Nervi)
- 158 35a Internacia Junulara Kongreso: Asteriksa kongreso de TEJO (Ian Jackson k.a.)
- 159 Nova Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
- 160 Kongreseroj . . .

La kovrilo

Okazas iel subkonscie, neintence, ke niaj kovriloj ĉiam pli ofte mozaikecas. Ĉu vi foje demandis vin, kial tio okazas? Almenaŭ provizora respondo estu la fakto, ke la laboron de UEA partoprenas ĉiam pli kaj pli da homoj. Tiel estis ankaŭ en Lucerno. Tial mozaiko sur nia kovrilo. Cetere, Lucerno dum la kongresa semajno estis nekredeble riĉa je tuta svarmo da interesaj movadaj moŝtoj kaj eminencoj, grizaj kaj grizharaj, kiuj ne tiel oftas en la Kongresoj. Imagu, oni povis tie paroli kun ekz. Waringhien, trinki glaseton kun Régulo-Pérez, readmiri la barbon de Tibor Sekelj, surpriziĝi pri la lipharoj de Hau-penthal, identigi la pseŭdonimojn Cicio Mar kaj Jóhan Valano, renkonti ĉiujn redaktorojn de "Heroldo" (estis tie ankaŭ Teo Jung), manpremi kun Sylla Chaves, konstati, ke Mauro Nervi ankaŭ fizike ekzistas. Kelkaj tamen mankis.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1 p. 500 gld. 1/2 p. 265, 1/4 p. 145, 1/8 p. 85, 1/16 p. 55 gld. Ne-Esperantaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo, eksteraj rilatoj kaj la Financa Pro-gramo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) 259 8821.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefo-no (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona aga-do: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mi-lanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.



Sur la prezida podio (de maldekstre): S. MacGill (prez. de TEJO), A. Pettyn, G. Waringhien, U. Grattapaglia, W. Bormann, M. Luchsinger (urbestro), K. Greutert (prez. de LKK) kaj W. Gut (reprezentanto de la kantona registaro) Foto: J. Ošap

SOLENA INAŬGURO DE LA 64a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO:

Gastoj aklamas nian agadon

”ĈU KONGRESO aŭ hejmenigo? Ĉu vizito eksterlanden aŭ reveno al la propra lando? Kongresante en Lucerno en 1979, ni revenas al la lando de nia fondiĝo, ĉar ĉi tie, en 1908, fondiĝis Universala Esperanto-Asocio.” Tio estis la unuaj vortoj eldiritaj en la 64a Universala Kongreso de Esperanto, kiu inter la 28a de julio kaj la 4a de aŭgusto kunvenigis en la Arta kaj Kongresa Domo de Lucerno 1635 gekongresanojn el 49 landoj.

”La fakto, ke UEA fondiĝis en Svislando, apenaŭ estas hazardo, ĉar la demokrataj tradicioj de Svislando kaj ĝia reputacio kiel lando neŭtrala donas fekundan teron por internaciaj institucioj”, diris plue d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, en sia malferma alparolo en la Solena Inaŭguro de la 64a UK.

Post la bonveniga parolado de Kurt Greutert, prezidanto de la LKK, en kiu li dankis al pluraj landaj kaj urbaj instancoj, kiuj malavare subtenis la Kongreson, Tonkin prezentis la homojn, kiuj sidis sur la solene ornamita podio (vidu la fotojn ĉi-paĝe).

D-ro Walter Gut, registara konsilisto, edukdirektoro de la kantono Lucerno, membro de la Honora Komitato de la 64a UK, parolis – en klara kaj senriproĉa Esper-

anto – nome de la svisa federacia prezidanto Hans Hürlimann, alta protektanto de la Kongreso, kaj nome de la kantona registaro. Li diris i.a. jenon: ”La lingvo-baro estas unu el la grandaj obstakloj sur la vojo de la interkompreniĝo kaj paco. Kiu sukcesos forigi ĝin?

Tio estas unu el la grandaj celoj de UEA, kiu sendube kontribuas al pli granda ŝanco de vera interkompreniĝo ... Mi opinias, ke vi pere de viaj klopodoj pri politike senŝargita universala lingvo kontribuas por vekoj kaj pli-fortigi tiun volon de interkompreniĝo kaj la klimaton de reciproka kompreno kaj paco.”

Sekvis salutoj al la aliaj ĉeestantaj membroj de la Honora Komitato: s-ro Scherer (nome de Gilbert Duboule, nacia konsilisto, prezidanto de Europa Unio), d-ro J. Bühlmann (nome de la Episkopo de Bazelo, kiu sendis ankaŭ personan mesaĝon al la Kongreso) kaj s-ino Helga Kohler, vicprezidanto de Svisa Sindikata Unuiĝo.

Inĝ. Matthias Luchsinger, urbestro de Lucerno, diris (denove en Esperanto), ke ”personaj amikaj kontaktoj pli kontribuas al interkompreniĝo inter la popoloj, ol la ofte en la vento parolataj vortoj de politikistoj.” Li forte esprimis sian konvinkon, ke Esperanto ”povas esti ilo, kiu mondvaste kaj senpene supervenkas la ne-



R. Muller (ĝenerala sekretario de EKOSOK), C. Piron (rektoro de ISU), C. Støp-Bowitz, I. Mórocz (prez. de Svisa E-Societo), F. Szabó-Felső kaj G. Maertens. Parolas la prezidanto de UEA Humphrey Tonkin. Fotoj: J. Ošap kaj Z. Nikolov

nombrelajn lingvajn barojn". "Vi reprezentas humanan kaj noblan celon. Valoras por tio labori", diris la urbestro de Lucerno.

Post orgena interludo de David Hill, la prezidanto komunikis al la Kongreso la skribajn salutojn de Unesko, Universala Poŝta Unio, UN-Oficejo en Ĝenevo, Universitato de UN en Tokio, Monda Organizo pri Sano, Monda Organizo pri Intelektaj Proprietaĵoj, Organizo de Afrika Unueco kaj Organizo de Amerikaj Ŝtatoj.

La ĉefparolanto en la Inaŭguro estis Robert Muller, sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de UN. Li parolis franclingve, sed la kongresanoj ĝustatempe ricevis skriban tradukon. La kompleta teksto de tiu instrua kaj inspira parolado aperas aliloke en ĉi tiu numero (vidu la paĝojn 143–146).

Plia orgena interludo kondukis al tiu tradicia inaŭgura revuo de diplomatoj kaj aliaj ŝtataj reprezentantoj. R. Schrijvers, aferŝarĝito (Belgio) salutis en Esperanto: "Via Kongreso estas edifa ekzemplo por la tuta homaro." O. do Amaral, konsilisto pri kulturo (Brazilo) esprimis sian kontenton, ke la 66a UK en 1981 okazos en Brazilo kaj anoncis, ke la alta protektanto de tiu UK estos la prezidento de Brazilo. Ĥristo Darenkov, ambasadoro (Bulgario) salutis nome de sia registaro. Ĉeestis E. Klár, konsilisto (Ĉeĥoslovakio). Vong Kian-bang, aferŝarĝito (Ĉinio), diris: "Esperanto estas alte taksata de la ĉina registaro." Ĉeestis ankaŭ Ŝu Ŝizong, kultura sekretario de la Ĉina Ambasaduro en Svislando. P. Vinthen, unua sekretario (Danlando) legis Esperante sian saluton, kiun enestis ankaŭ jena atentigo: "Antaŭ ol esperi je iu progreso, estas esence necese interkomuniki kaj tiel rompi la izoligon, kiun povas kaŭzi lingva baro". Ĉeestis P. Barnier, aferŝarĝito (Francio). K. Laqueur, aferŝarĝito (FR Germanio) parolis en Esperanto. Ĉeestis M. Wagner, ambasada sekretario (Germana DR), N. Carambellas, gazetara konsilisto (Greklando), I. Majoros, kultura ataŝeo (Hungario). B. Ragnarsson alportis specialan saluton de la prezidento de Islando, d-ro Kristján Eldjárn, kiu i.a. diris: "Kun ĝojo mi rimarkis, ke Esperanto nun ĝuas pliiĝantan prosperon sur la internacia tereno, kaj mi scias, ke en mia lando ĝia afero altiras ĉiam pli grandan atenton." D-ro Iannaccone salutis nome de la itala konsulejo. M. Barić, aferŝarĝito (Jugoslavio) en Esperanto diris i.a.: "Sur la kampo de la klopodoj por realigo de lingva egalrajteco de diversnaciaj homoj, via Movado prezentas gravan kulturan fenomenon en la hodiaŭa mondo." Marta Jiménez Martínez, ambasadorino de Kubo, transdonis al la Kongreso ankaŭ la salutojn de la ĵus oficialigita Kuba Esperanto-Asocio. Nome de la registaro de Norvegio parolis J. Matland, kiu aludinte la historion de sia lando diris: "Ne sukcesinte enkonduki la norvegan lingvon kiel internacian, ni interesiĝas en la disvastigo de neŭtrala internacia lingvo." J. Major, reprezentanto de la registaro de Nov-Zelando, portis salutojn de la nov-zelanda ĉefministro. B. Bogdański, ambasadoro de Pollando, inspire parolis pri la proksimeco de la idealoj de Unesko kaj Esperanto. Ĉeestis

ankaŭ R. Jönnerby, aferŝarĝito (Svedio) kaj M.T. Barry, dua sekretario (Usono).

En la salono estis ankaŭ s-ro Stadler, direktoro de PTT-distrikto Lucerno, reprezentantoj de Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj, Internacia Asocio por la Interŝanĝo de Studentoj por Teknika Spertigo, Laborkomunumo Federalismo, Registro de Mondcivitanoj, provinca registaro de Trento (Italio). Skriba mesaĝo al la Kongreso venis ankaŭ de kardinalo Franz König, ĉefepiskopo de Vieno.

Valoris atendi la finan parton de la Inaŭguro por ne maltrafi unike ĉarman saluton de la infanoj, kiuj partoprenis la 17an Internacian Infanan Kongreseton. Ili ĉiuj suriris la podian tablon kaj la apudajn seĝojn, por diri almenaŭ sian nomon kaj landon antaŭ la mikrofono. Estis tie infanoj el Irano, Usono, Japanio, Kolombio, Hungario, Germanio, Bulgario, Francio, Svislando. Yukiko Isobe kompletigis tiun infanan festoparton per transdono de du grandaj japanaj pupoj — Taro kaj Hanako, iliaj nomoj —, kiujn la japana Komitato "Interŝanĝi Pupojn por Paco" sendis donace al UEA, la sola internacia organizaĵo krom Unuiĝintaj Nacioj, al kiu tiu Komitato sendis la pupojn, kies paruloj disiris el Japanio al 101 landoj de la mondo. UEA decidis konservi la pupoparon en la lernejo de la Esperanta infana komunumo "Bona Espero" en Brazilo. La finaj vortoj de Tonkin direktiĝis unuavice al la ĉeestantaj honoraj gastoj. Li diris i.a. jenon: "Ni ne rigardis nian lingvon kiel panaceon: homoj povas interbatali kaj malkonsenti ankaŭ per la sama lingvo. Sed ni ja opinias, ke pro sia facileco, sia fleksebleco kaj sia dumlonga utiligo Esperanto prezentas la plej efikan ilon por la komunikado inter la kulturaj kaj lingvaj grupoj. Ni agnoskas, ke ĝi ne solvas ĉiujn problemojn,



sed ni samtempe konscias, ke ĝi funkcias mirige bone kaj ke ĝi ebligas sinesprimadon de la plej simpla ĝis la plej nuancoplena nivelo... Ni ne eksperimentas pri tio, ĉu povus eventuale ekzisti internacia lingvo, ni praktikas tian lingvon... Mi do turnas min aparte al la landaj reprezentantoj ĉi tie kaj mi petas, ke ili levu kun siaj registaroj la eblecon, ke tiuj registaroj insistu, ke la demando pri la lingva problemo estu metita en la tagordon de la grandaj internaciaj organizoj."

La mondo bezonas vin

Robert Muller, la ĉefparolinto en la Solena Inaŭguro de la 64a UK en Lucerno, apartenas al la plej



altrangaj internaciaj funkciuloj aperintaj sur la movada scenejo ĝis nun. Tamen, la sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio ne estas nova nomo por la legantoj de nia revuo: en nia numero de marto ĉi-jare aperis lia sagaca teksto "Bezono de edukado al tutmon-

deco". Jen ĉi tie la plena teksto de la lucerna parolado de Muller, en la traduko de C. Piron. (Sur la foto: Robert Muller)

KIAM LA HISTORIISTOJ pristudos nian epokon por elpentri ties fundamentajn trajtojn, ili sendube akorde konkludos, ke la finon de la 20a jarcento esence karakterizis du fenomenoj:

1) planedskala konsciigo, senprecedenca en la tuta homara evoluo;

2) mutacio de la naturo mem de la homa specio.

Koncerne la unuan fenomenon, ni konstatas, ke ekde la fino de la dua mondmilito, abundego da problemoj, kiuj ĝis tiam pli malpli aperis nur je nacia aŭ regiona nivelo, senĉese vastiĝas al tutplaneda skalo. Historio, kia ĝi nunmomente disvolviĝas sub niaj okuloj, esence turniĝas ĉirkaŭ du polusoj, aŭ estas ludata de du kunroluloj: la homa specio, kiu fariĝis superreganta, kaj nia eta planedo Tero. Kiom ajn reliefiĝas — sur la vasta fono de historio — la naciaj kaj grupaj celaroj, idealoj kaj problemoj, malfermiĝas ĉapitro tute nova: la homaro finfine serĉas sian optimalan lokon, disfloradon, pacon, harmonion kaj feliĉon sur planedo nun ĝisfunde konata, kiun la homo kapablas transformi kaj administri por ĉies plej granda bono. Jen estas la defio, la giganta tasko, al kiu la nova epoko — jam larĝe malfermita — devos nun respondi. Ĉiuj krizoj, timoj, angoro, difinoj de starpunkto kaj konfliktaĵoj, kiujn ni ĉeestas, estas nur epifenomenoj sur la evoluada ondegro ekkaptinta la homaron. Jaron post jaro, la vastaskalaj prizorgoj naskataj de tiu nova fazo en nia evoluo, ĉefrolas en la historio, forpuŝante al la postscenejo la ofte troajn pretendojn de l'nacioj kaj de multnombraj aliaj grupoj, kiuj plu malprave imagas, ke historio, estanteco kaj estonteco rotacias precipe ĉirkaŭ ili.

La dua fenomeno ne estas malpli giganta: ekde la industria revolucio, kaj ĉefe rezulte de la sinsekvaj ondoj de sciencaj revolucioj, kiuj de tridek jaroj konstante manifestiĝas, la specio homa fariĝas nova specio. La efiko de niaj fizikaj kaj intelektaj kapabloj, same kiel de ĉiuj niaj sensoj, aŭ de preskaŭ ĉiuj, ja mirakle ampleksiĝis: uzinoj kaj mirovekaj maŝinoj multobligis nian manforton, dum nian fizikan movkapablon obligis transportiloj pli kaj pli rapidaj; nia vidpovo atingas la senfine grandan dank'al gigantaj teleskopoj, kaj la senfine malgrandan per elektronaj mikroskopoj, pikoskopoj kaj nubokameroj; nia aŭdradiuso etendiĝas al la tuta Tero kaj al la spaco transatmosfera dank'al telefonio kaj radio; nia cerba kapablo memori, kalkuli kaj inventi mireginde multobligis dank'al la komputoroj. Ni "tele-vidas", ni "tele-parolas" kaj ni eĉ "tele-laboras", ja sur Marso instrumentoj analizas por ni la grundon de tiu planedo. Kaj tio estas nur la komenco de procezo ege pli vasta: la plimulto el la progresoj, kiuj aperis, dum la homaro tiel transcendis kaj mutaciis, ja okazis nur sur la kampoj materia kaj mensa. La homo ankoraŭ devas etendi la dimension de sia spirito, de sia animo kaj de sia koro al la tutaj Tero, homaro, kaj eĉ universo, por plene realigi sian disfloradon. Tiu nova dimensio baldaŭ ankaŭ impone ekbrilos en la erao, kiu malfermiĝas antaŭ ni.

Tiuj du fenomenoj eble plej elstare respeguliĝas en tio, kion oni povas ĝenerale nomi "internacia organiziĝo", t.e. en la tuto de la aranĝoj kaj rimedoj internaciaj kaj mondaj, kiuj celas respondi al tiu evoluo, aŭ eĉ ĝin akceli. Inter tiuj rimedoj, kiel ĝuste rimarkigis via prezidanto, prof. Tonkin, en sia referaĵo alkongresa, unuavice troviĝas Unuiĝintaj Nacioj kaj ties specialigitaj institucioj, kiujn li priskribas kiel la plej disvolvitan mondan organizon, kiun la homoj iam ajn kreis; sed citindas ankaŭ la grandaj religioj, la transaciaj entreprenoj, la regionaj komunumoj kaj grupiĝoj, same kiel la internaciaj privataj asocioj kun scienca, profesia aŭ alia karaktero, da kiuj dekoj da miloj nuntempe ekzistas, kaj kiuj iĝas pli kaj pli multaj kaj vastaj.

Eble la plej impresa maniero illustri tiun internacian fenomenon estas simple listigi la 32 specialigitajn instituciojn kaj mondajn programojn, kiuj kune konsistigas la UN-sistemon. Jen mi ilin citos, petante vin pripensi ĉe ĉiu nomo pri la amplekso de la planeda kaj homa problemaro, kiun ĉiu el ili pritraktas.

La 18 specialigitaj institucioj estas la jenaj: Atomenergia Agentejo, Internacia Labor-Organizo, Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo, Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo (Unesko), Monda Organizo pri Sano, Internacia Banko, Internacia Asocio por Evoluigo, Inter-

nacia Financa Societo, Internacia Valuta Fonduso, Organizo pri Internacia Civila Aviado, Universala Poŝta Unuiĝo, Monda Meteologia Organizo, Internacia Unuiĝo pri Telekomunikado, Internacia Martransporta Organizo, Interkonsento pri Doganoj kaj Komerco, Monda Organizo pri Intelektua Proprieto, Monda Turisma Organizo, Internacia Fonduso por Agrikultura Disvolvo.

Kaj jen nun la 14 mondprogramoj de UN: UN-Fonduso por la Infanaro, UN-Konferenco por Komerco kaj Evoluigo, UN-Programo por Evoluigo, Oficejo pri Naturaj Katastrofoj, Programo pri la Ĉirkaŭmedio, Programo pri Narkotaj Drogoj, Alta Komisarejo por Rifuĝintoj, Organizo por Industria Disvolvado, Esplora kaj Trejna Instituto, Fonduso por Priloĝantaraj Agadoj, Agentejo por Helpado al Meza Oriento, Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, Programo de UN-Volontuloj kaj Tutmonda Nutraĵa Programo.

mi, kiu servis UNon tridek-jare, tiu kunaĵo aperas kiel la uŭa ero de vizio, cerbo kaj nervaro komunaj al la nova homspecio aŭ "transspecio", "metaspecio", nun kreiganta.

Centre de tiu fenomeno staras la bezono komuniki. Starigi taŭgan sistemon por ebligi perceptadon, analizon, konkludadon kaj pripensadon, por difini valorojn vere homajn kaj por transdoni mesaĝojn al ĉiuj membroj de la homa familio ja prezentas per si la centran problemon de nia epoko.

Vastatrajte skizite, la komunikada problemo en UN prezentigas jene:

Verdire, la sistemo ne multe diferencas de tiu de la homa korpo: necesas vidi, percepti, aŭskulti, koni kaj rekoni la tutan ĉirkaŭaĵon spacan kaj tempan, en kiu la homa vivo disvolviĝas. Mondskale, tio fariĝas pere de vastega agado statistika, enketa, informkolekta kaj pri-



De tiu listo forestas la problemoj pri milito kaj paco, pri malarmado, pri la spaco transatmosfera, pri maroj kaj oceanoj, pri naturaj riĉaĵoj, pri homrajtoj, pri egaleco rasa, pri virinoj, transnaciaj firmaoj, pri krimeco, ktp., pri kiuj UN okupiĝas mem, ĝis la respektiva speciala institucio aŭ programo estos starigita.

Tiu tuta reto kovras la plimulton el la tutmondaj problemoj, al kiuj la homaro frontas, de la transatmosfera spaco ĝis la atomo, de la konservado de historia heredaĵo ĝis preparo de la estonteco, de la rajtoj de la homa persono ĝis la paco tutplaneda, de arto ĝis krimologio, de la infanaro ĝis maljunulaj problemoj, ktp. Nur la spirita vivo ankoraŭ mankas en tiu kosma terenaro, sed ankaŭ tio certe trovos iutage sian lokon en ĝi, kiel konstante antaŭdiris Dag Hammarskjöld kaj U Thant. Al

studa, al kiu miloj da internaciaj dungitoj sin dediĉas kun la celo helpi al abundo da kunvenoj, al larĝa gamo da fakulaj renkontiĝoj kaj al multaj politikistoj; prezenti kompletan tabelon de tiuj agadoj tute simple ne plu eblas, tiel ampleksaj ili estas.

Poste sekvas cerba funkciado: el ĉio ĉi necesas tiri konkludojn por la komuna bono de la homaro. Tio efektiviĝas unue en fakulaj kunvenoj, regionaj organoj kaj institucioj laborantaj super difinita kampo: la mondo ricevas konkludojn rilatajn al demografio, ekonomio, sociaj aferoj, laboro, sano, malsato, edukado ktp. Poste venas la vico de la sintezantaj organoj, nome la Ekonomia kaj Socia Konsilio kaj la Ĝenerala Asembleo de UN, kies tasko estas malimpliki la ĝeneralajn tendencojn, la novajn minacojn kaj la akiritajn atingajojn, kaj reko-

mendi al la popoloj ŝanĝi sian sintenon, alpreni novan politikon kaj laŭnecese adapti sin al la ĝeneralaj sintrudaj realaĵoj, kiuj estas malkovritaj.

Finfine rolas la nerva funkciado: la ĝeneralaj konkludoj rilataj al la stato, progreso kaj sorto de la homaro devas transdoniĝi al ĉi-lasto. Ĉar, ho ve, pro ofte diversaj kaŭzoj la distanco inter la internaciaj organizaĵoj kaj la popoloj estas tro granda, tiun funkcion esence plenumas la registaroj, la gazetaro kaj la aliaj inform-sistemoj, la edukistaro kaj la neregistaraj organizaĵoj kiel la via. En la lastaj jaroj oni uzis la eblecojn, kiujn prezentas grandaj mondkonferencoj kaj internaciaj jaroj, kun la celo dissendi la mesaĝojn al la popoloj: konferencoj pri loĝantaro, ĉirkaŭmedio, junularo, virinoj, loĝproblemoj, nutraĵaj demandoj, dezertoj, akvo, scienco kaj tekniko, klimato, specialaj sesioj de la Ĝenerala Asembleo pri energio kaj evoluigo, internacia jaro pri la infano nun okazanta, internacia jaro por



Robert Muller antaŭ sia publiko en Lucerno: "Mi deziras al vi grandan sukceson en la nobla kaj viziista tasko, kiun vi prenis sur vin".

Fotoj: Z. Nikolov

handikapitoj en 1981, monda konferenco pri maljunuloj en 1982, internacia jaro pri komunikado verŝajne en 1983.

Multo mankas, ĝis la sistemo estos plene kontentiga. Je ĉiu stadio, egale ĉu percepta, sinteza aŭ transsenda, ĝi ankoraŭ primitivas. Sed ĝi almenaŭ havas unu meriton: ĝi ekzistas, unuafoje en la homa historio, kaj mi estas konvinkita, ke la registaroj ĝin perfektigos de jaro al jaro por pluvivi mem, kaj por certigi, ke la tuta homaro pluvivos. Mia opinio, en nia evoluo la tempo venos, kiam tiu sistemo funkcios preskaŭ same instinkte kaj rapide, kiel nun, post milionoj da evoluojaroj, la homa persono funkcias. Estas simple demando pri tempo kaj penado. La novaj kaj potencaj komunikrimedoj tion ebligas rapide. La mondon ŝanĝos precipe ili. Cetere,

ĉiu generacio riĉiĝas per la antaŭaj spertoj, pli bona ĝenerala edukado, akcidentoj, mispaŝoj, eraroj kaj sukcesoj. La homaro ankoraŭ troviĝas je la stadio de kolektiva infaneco: ni ofte devas provi, ofte devas brulvundi al ni la fingrojn, antaŭ ol ni lernas. Ofte, en mondaj aferoj, ne intuicio, ne longperspektiva intelekta agado ebligas konscii pri problemoj, sed akcidento, aŭ situacio kriza. Sed ankoraŭ la unuaj grandaj sukcesoj manifestiĝas: sufiĉis averti la homan familion, ke ĝi nombre iĝis troa, por ke ni povu hodiaŭ konstati malakcelon demografian; sufiĉis, ke la stokholma konferenco pri la ĉirkaŭmedio okazis, por ke ĉiu lando starigu tiuteman ministerion. La ŝipo "Homaro" evitis multajn rifojn dank'al similaj ĝeneralaj avertoj, kaj la rimedoj investitaj en UN fruktiĝis en riĉajn dividendojn. Kie finfine situas lingvoj en tiu komunika reto, kiu iom post iom invadas la tutan korpon homaran?

Strange, la lingvo ŝajnas esti nur duaranga zorgo ĉi-stadie. Lingvoj similas naciojn: ili ekzistas kiel fruktoj de longa historio kaj evoluo en medio pli malpli izolita; ili estas realaĵo, kiun ekstreme potencaj rimedoj defendas. El realisma vidpunkto, nek la organizo de l' mondo laŭ naciaj unuoj, nek la lingvomulteco montriĝis nuntempe ŝanĝebla. Ne la formo estas ĉefa, sed la substanco: necesas, ke la nacioj kunvivu pace, ke ili komprenu la kolektivajn problemojn, ke ili adaptiĝu unu al la aliaj, ke ili alprenu la politikon necesan por la komuna bono de la homaro, ke ili malkreskigu siajn pretendojn kaj agresemon, ktp. La situacio iom similas rilate al lingvoj: la strukturo kuŝanta sub ĉiu lingvo homa, nome la konceptoj pri paco, justeco, bonkoreco, prospero kaj homa digno, finfine valoras pli multe ol la aparta formo, per kiu ĝi esprimiĝas.

La internaciaj sekretarioj ĝenerale laboras dulingve: angle kaj france. La internaciaj kunvenoj de UN plej ofte uzas kvin lingvojn. Kompreneble bedaŭrinde, ke kiam la interŝtata organizo naskiĝis, ĝi ne alprenis universalan lingvon, almenaŭ je la nivelo de sekretarioj kaj internaciaj kunvenoj. Oni tiel preterlasis grandan historian okazon. Kiom koncernas perceptadon kaj transdonon, ni agas pere de la registaroj, gazetaro, neregistaraj organizaĵoj kaj edukistaro: tie tradukiĝas en la diversajn lingvojn la mesaĝoj kaj rekomendoj de UN kaj de la specialigitaj institucioj. Kiel pri la politika strukturo de la planedo, tiel same pri la lingva strukturo ĉia diskuto videble evitiĝas en UN nuntempe: ekzistas tiom da substanciaj problemoj, kiuj zorgigas la homaron, ke la formoj estas provizore preterlasitaj, ĝis pli favora tempo venos.

Lingve, la mondo prezentas jenan ĝeneralan bildon: ekzistas proksimume 5 000 lingvoj, el kiuj nur duono havas skriban formon. Pluraj el tiuj lingvoj — la plej malaltaj sur la skalo de graveco — mortas ĉiujare. Supre, konstateblas, ke naskiĝas novaj lingvoj, precipe sciencaj, kiuj multobligas je konsiderinda ritmo: miloj da sciencaj terminoj ja ĉiunmonate kreiĝas. Surkampe de la komputaroj, novaj lingvoj eĉ estas kreataj de firmaoj, kiuj certigas al si monopolon super ilia uzo. La internaciaj institucioj strebas enmeti iom pli da ordo

tiukampe, precipe Unesko, sed ankaŭ ĉiu specialigita institucio en sia aparta sfero. Interesajn ekzemplojn oni povus citi, aparte sur la kampoj de saneco kaj aviado, sed ankaŭ sur aliaj. Tamen, verdire, ne ekzistas tutmonda lingva politiko. Malantaŭ tiuj sciencaj lingvoj staras la lingvoj uzataj por internacia komunikado, ĉefe la angla kaj franca, kaj ankaŭ, pli kaj pli, la hispana. Post tiuj troviĝas la naciaj lingvoj, kies graveco ege diferencas laŭ la demografio, kaj kiuj estas tre profunde enradikiĝintaj, ĉar ili estas ligitaj al la politika, ekonomia kaj kultura fenomeno. Mi ne povas longe profundigi en la vasta gamo de la lingvaj problemoj ĉi-planedaj, kaj limigos min je subteno al la rekomendo de prof. Tonkin, nome ke oni entreprenu ĝeneralan studon de la problemo, ke oni inventaru ĉion, kio tiukampe okazas, kaj provu alpreni tutmondan lingvan strategion por nia planedo.

Mi opinias, ke tiurilate la Esperanto-movado kaj via kongreso povas ludi gravegan rolon. Ne pro tio, ke monda registaro aŭ kompleta malarmado aŭ universala lingvo nun ne ŝajnas ebla, oni evitu tion priparoli kaj diskuti. Tute male. La mondo senĉese bezonas modelojn, kiuj impresu al la imago kaj al la mond-vizio de la homoj. Ni bezonas revojn. Preskaŭ ĉiuj grandaj mutacioj en la historio rezultis el revoj kaj pensoj viziaj. Eble hodiaŭ la mondo ne plu revas sufiĉe. Eble tial ni pasas tra pesimisma fazo ĝuste tiam, kiam ni staras je la montopinto de senprecedencaj sukcesoj kaj eĉ promesoj ankoraŭ pli vastaj. Kiam mi estis infano oni multe parolis pri Esperanto kaj pri mond-registaro. Oni ilin mencias malpli ofte hodiaŭ. Tio ne estas bona. Necesas memorigi al la ekzistantaj potencoj, ke sur nia planedo eblas aliaj administraj formoj. Tio almenaŭ prezentos tiun avantaĝon, ke ili fariĝos iom

pli viziemaj kaj iom malpli necedemaj. Mi do tutkore deziras, ke el via kongreso fontu aŭdaca strategio, kiu denove tuŝu la imagon kaj la animon de la homoj. Tiun strategion devus akompani apartaj agadoj precipe direktitaj al la internacia komunikado kaj al ties ĉefaj rimedoj aŭ perantoj: UN kaj ties specialigitaj institucioj, la transnaciaj firmaoj, la gazetaro kaj aliaj inform-rimedoj, la religioj, la internacia eduksistemo, la internaciaj transportoj, la internaciaj neregistaraj organizaĵoj, turismo, hoteloj, ktp.

Mi deziras al vi grandan sukceson en la nobla kaj viziista tasko, kiun vi prenis sur vin, kaj kiu estas nenio alia — longperspektive — ol starigi mondan demokration, specife pere de la uzo de lingvo universala. La mondo bezonas vin. Unuiĝintaj Nacioj bezonas vin. Ni ĉiuj devas komune konstrui mondon de paco, de justeco, de progreso, de bonfaro kaj de feliĉo.

Robert Muller



Foto: Jovan Oŝap

Kongresa rezolucio

La 64a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lucerno, Svislando, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto, 1979, kun 1635 partoprenantoj el 49 landoj, kaj studinte la temon "Lingvaj aspektoj de internacia organiziĝo", konstatas:

1. En nia epoko kontaktoj inter la nacioj, okazantaj jam de la plej fruaj historiaj epokoj, draste plimultiĝas, parte pro la rapida evoluo de la komunika teknologio, kaj parte pro la kreskanta interplektiĝo de la intereso de la nacioj en sociaj, ekonomiaj, kulturaj, juraj kaj aliaj terenoj.
2. Lingvaj samecoj kaj diferencoj ludas tre signifan rolon en la formiĝo de internaciaj kontaktoj kaj de la organizaj strukturoj, kiuj kreiĝas por ebligi tiujn kontaktojn.
3. La kontaktoj emas sekvi liniojn de la internacia disvastiĝo de la unuopaj lingvoj; tiu disvastiĝo siavice estas rezulto de historiaj, ekonomiaj kaj politikaj evo-

luoj, kaj en multaj kazoj ĝi estas postlasaĵo de la kolonia epoko.

4. Lingvaj diferencoj siavice grave malhelpas la kreadon de horizontalaj strukturoj por transponti la menciitajn interesoliniojn.
5. Interalie, tiaj diferencoj ĝenas la agadon de ĉiuj ĉefaj interregistaraj organizoj tutmondaj kaj regionaj; la lingvaj servoj de la menciitaj organizoj foruzas grandan parton de iliaj buĝetoj, kaj la lingvaj reguloj aplikataj en la organizoj kaŭzas gravajn diskriminaciojn kaj maljustaĵojn.
6. Ankaŭ en aliaj formoj de internacia organiziĝo, ekzemple multnaciaj entreprenoj kaj sciencaj organizoj, aplikiĝas lingvaj praktikoj severe diskriminaciaj, kiuj favoras iujn lingvojn kaj malfavoras aliajn, tiel donante signifajn avantaĝojn al iuj landoj kaj ne al aliaj, kaj minacante kulturajn pluralismon kaj egalecon.
7. En internaciaj organizoj oni ĝis nun ne trovis adekvatan solvon al la problemo de lingva diverseco, precipe

Parado de landaj asocioj

KIAM oni antaŭ kelkaj jaroj decidiĝis dividi la kongresan inaŭguron en du partojn, la celo ne estis anstataŭ unu havi du longajn solenaĵojn. Tamen, ni havis ĝuste tion ĉi-jare en Lucerno: la trihoran Inaŭguron en la dimanĉa mateno sekvis same longa Malfermo en la posttagmezo. Sub la prezido de prof. C. Støp-Bowitz, unue venis la salutoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj: Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (parolis bretone M. Texier), Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj (R. Glarner, v. la tekston sur p. 148), Kongreso de Mondcivitanoj (G. Marchand), Laborkomunumo Federalismo (d-ro Roemheld), Skolta Monda Organizaĵo (d-ro Rónai), Sennacieca Asocio Tutmonda (M. de Sassi).

La tradicia revuo de la landaj salutantoj disvolviĝis ĉi-jare iom pli rapide, sed konservis sian tutan buntecon. Salutis, laŭvice: M. Angel Ruffinengo (Argentino), L. V. Scott (Aŭstralio), E. Majtaniĉ (Aŭstrio), K. Tytgat (Belgio), C.A.S. de Cunha kaj S. Chaves (Brazilo), A. Duerden (Britio), N. Aleksiev (Bulgario), J. Jermář (Ĉeĥoslovakio), L. Egholm (Danlando), T. Tyynelä (Finnlando), J. Chef d'homme (Francio), D. Herle (FR Germanio), R. Hahlbohm (Germana DR), K. Polihroniadis (Greklando), M.R. Urueña de Hernández (Hispanio), I. Kutás (Hungario), H. Sæmundsson (Islando),



Foto: Zdravko Nikolov

Gratuloj kaj bondeziroj de ni mem al ni mem: Salutantoj de la landaj asocioj atendas sian vicon ĉe la mikrofono.

M. Landau (Israelo), A. Bassetti (Italio), Y. Isobe (Japanio), Z. Tišljarić (Jugoslavio), Y. Bellefeuille (Kanado), Kim Yung-myung (Korea Respubliko), P. Parini (Luksemburgo), E. Kervers-van Tholen (Nederlando), O. Kjønsvik (Norvegio), F. Swift (Nov-Zelando), M. Dobrzyński (Pollando), A. Rodrigues Correia (Portugalia), C.S. Beckford (Sud-Afriko), R. Lindblom (Svedio), I. Morocz (Svislando), J.B. Massey (Usono), F. García Blázquez (Venezuelo). Nome de la landoj kun nealigitaj landaj asocioj salutis: Zhang Qicheng (Ĉinio), L. Mejía (Kolombio), M. Isaev (Soveta Unio). Por la landoj sen organizita Movado parolis: T. Megalli (Egiptio), H. Negash (Etiopio), B. Samimy (Irano), H. Eloisli (Maroko), M. Michelotti (San Marino) kaj A. Grine (Tunizio). Skribe salutis: Ĉilia Esperanto-Asocio, R. Molera, S. Kawamura, Pola Esperanto-Teatro, I. Bo-

ĉar la lingva praktiko de tiuj organizoj estas bazita sur la supozo, ke ekzistas komune akceptebla ekvilibro inter lingva egaleco (la traktado de ĉiuj lingvoj kiel egalaj) unuflanke, kaj lingva unueco (la utiligo de unusola etna lingvo) aliflanke; tiu supozo estas fundamente erara kaj povas konduki al politikaj rivalecoj, diskriminacio kaj superflujaj elspezoj.

8. Kelkaj organizoj, interalie Universala Esperanto-Asocio, aplikas alian solvon — la utiligon de la Internacia Lingvo Esperanto; tiu solvo samtempe ebligas egalecon (ĉiuj partoprenantoj en la laboro uzas duan lingvon, kiun ili devas lerni, sed kiu estas relative facile akirebla de ĉiuj homoj), kaj unuecon (ili uzas nur unu lingvon).

9. Post preskaŭ cent jaroj da utiligo en plej diversaj cirkonstancoj kaj medioj, Esperanto plene konfirmis siajn pretendojn al serioza atento kiel funkcia solvo de la problemo de lingvo en internacia organiziĝo; ĝi estas hodiaŭ uzata de centmiloj da homoj tra la tuta mondo kaj grave kontribuas al internacia kompreniĝo.

10. Malgraŭ la signifoplenaj atingoj de Esperanto, ĝi nuntempe ne ricevas sufiĉan seriozan atenton de la

grandaj interregistaraj organizoj kaj en aliaj internaciaj organizaj strukturoj; male, al tiuj diversaj organizoj nuntempe mankas adekvataj respondoj, samtempe justaj kaj praktikaj, al lingvaj problemoj.

11. Universala Esperanto-Asocio notas kun konsiderinda maltrankvilo, ke la grandaj internaciaj organizoj hezitas doni al Esperanto seriozan atenton, ĉar ili ŝajne timas, ke tia atento estos interpretata kiel rekta subteno; sed ĝi atentigas, ke ne eblas fari seriozan sciencon kaj racian decidon pri fenomeno, kiun oni ne studis objekte kaj detale; ĝi plue atentigas, ke la menciitaj organizoj ne sukcesis trovi pli bonan aŭ eĉ egale bonan solvon al la lingva problemo ĝis nun, kaj ne donas esperon, ke ili tion atingos en la estonteco.

12. Sekve, Universala Esperanto-Asocio forte alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj tutmondaj kaj regionaj, ke ili dediĉu seriozan atenton al la lingva demando kaj al la solvo, kiun prezentas Esperanto.

Akceptita, nome de la 64a Universala Kongreso de Esperanto, de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio, en Lucerno, la 4an de aŭgusto 1979.

ciort, Asembleo de Bahaanoj en Svislando, S. Krajnov, M. Sancho-Izquierdo, F.W. Renteister k.a.

Post tiu longa ceremonia parto de la malferma solenaĵo, kie la parolantoj ofte eluzis la okazon por komuniki novaĵojn el sia lando kaj tiel produkti kvazaŭ ian kongresan eldonon de la revua rubriko "Loke — Fake — Persone", la prezidanto de UEA faris sian dum la lastaj

jaroj kutiman ĉefparoladon pri la stato kaj perspektivoj de UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale.

Tiu iom malpli ol unuhora parolado, enhavis ampleksan pritrakton de la eksteraj rilatoj de UEA, sektion pri la nova statuto de UEA kaj tutan aron da aliaj temoj kaj prikonsideroj. Ni aperigos la plej interesajn partojn de tiu parolado en nia oktobra numero.

RUDOLF GLARNER (Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj):

HEZITOJ KAJ BONDEZIROJ

... SENDUBE, s-ro prezidanto, vi komprenas, ke kiel reprezentanto de profesiaj konferencaj interpretistoj mi alparolas vian Kongreson kun iom miksitaj sentoj. Ĉar mi parolas ĉi tie nome de tutmonda organizaĵo, havanta nur ĉ. 1 500 membrojn, kaj mi parolas al la Kongreso de UEA, kiu atingis la imponan nombron de 32 000 membroj, kiuj celas evoluigi Esperanton ĝis tiu punkto, kie la lingvaj kapabloj de interpretistoj fariĝus superfluaj.

Ni demandis nin, ĉu ni povus akcepti vian afablan inviton, ĉu ni povus stari ĉi tie kaj deziri al vi sukceson en viaj klopodoj, entute, ĉu ni povus trovi komunan bazon kiel lingvistoj. Jes, tion ni povis fari, ĉar — baze — la celo de niaj du organizaĵoj estas sama, kvankam ni klopodas atingi ĝin per malsamaj vojoj — tio, ke ni ebligu al la popoloj de la mondo interkomuniki, paroli unu al la alia. Ni atingas tion helpe de perado, vi aliflanke atingas ĝin per komuna lingvo, kreita de brila menso, kun idealismo kaj celkonscio. Sed, ni ambaŭ klopodas antaŭenigi la interkompreniĝon inter la diversaj nacioj, rasoj kaj religioj de nia terglobo. Kaj, se tion ni sukcesos fari, ni ambaŭ estos donintaj kontribuon ankaŭ por la paco...

LA KOMITATO KAJ ESTRARO:

Longe, sed efike

ŜANĜIĜIS ĈI-JARE la tuta programo de la kunsidoj de la Komitato de UEA. Delonge sentiĝis, ke la plej gravaj aktivuloj de la Movado — ĝuste la komitatanoj — apenaŭ vidiĝas aŭ partoprenas en la ĝenerala kongresa programo, ĉar ili senĉese kunsidas inter si. Ĉi-jare, eksperimente, la Komitato do kunsidis jam ekde la vendreda mateno, kaj jam antaŭ la Inaŭguro de la UK la komitatanoj estis plenumintaj 13½ horojn da kunsidoj en la pleno kaj plurajn horojn en komisionoj! Tio teorie signifis, ke ili tiam estis liberaj por partopreni la ceteran programon ĝis ĵaŭdo, sed la praktiko montris, ke komisionaj kunsidoj, laŭ la konata leĝo de Parkinson, emas plimultiĝi por plenigi la disponeblan spacon...

La longeco de la statutaj pritraktoj kondukis al bona metodo por rapidigi la komitatan laboron. La diversaj komisionoj (pri edukado, landa agado, eksteraj rilatoj, kongresoj ktp. ktp.) kunsidis tuj en la vendredo antaŭ la UK, kaj ĉiu komitatano havis eblecon tie fari proponojn aŭ demandojn, kiuj aparte interesis tiun. Rezulte, la Komitato povis plejparte simple akcepti aŭ malakcepti la komisionajn raportojn sen temporabaj novaj diskutoj.

La komitato, interalie:

- Akceptis aliĝpetojn de Ĉilia Esperanto-Asocio (40 membroj) kaj Portugala Esperanto-Asocio (170 membroj). Per tio la nombro de aliĝintaj landaj asocioj denove atingis rekordon: 42 (9 pli, ol en 1974).
- Nomis kiel novajn honorajn membrojn: Emilija

Lapenna (Jugoslavio) kaj Hideo Shinoda (Japanio).

— Elektis Senad Čolić (Jugoslavio) nova komitatano C, anstataŭ Paul Peeraerts (kiu fariĝis salajrata oficisto).

— Nomis E.J. Woessink kiel revizoron (same anstataŭ Peeraerts).

— Akceptis novan regularon pri elekto de komitatanoj C, prezidanto, estraranoj kaj revizoroj, ĝustatempe por la elektoj okazontaj en 1980.

— Akceptis 4 rezoluciojn adresitajn al UN, Unesko, OAU kaj OAS.

— Amendis la buĝeton por 1980 (forigo de pozitiva saldo kaj samsuma malaltigo de la rimedoj el grafikaj laboroj).

— Decidis malfermi ŝparkontojn por membroj de UEA kun minimuma ŝparsumo de po 1000 gld., minimuma deponperiodo de unu jaro kaj rento de 6%. (Interesitoj petu detalojn ĉe la Centra Oficejo.)

Dume, la Estraro:

— Nuligis la kontrakton kun Mouton pri eldono de la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* kaj subskribis novan kontrakton kun la usona eldonejo University of Texas Press.

— Aprobis ĝeneralan planon por malfermo de nova oficejo en Nov-Jorko — unuavice por reprezentado de la Asocio ĉe UN — pagota el la Propaganda Konto.

— Nomis la juĝkomisionon por la Premio Raymond Schwartz.

— Donis aŭspicion de UEA por la 2-a Latinamerika Esperanto-Kongreso, okazonta en San Luis (Argentino), en 1980.

— Decidis pritrakti en la venonta UK en Stokholmo la temon "Diskriminacio" kaj okazigi krome seminario pri "Esperanto kaj enlandaj lingvaj problemoj".

— Atingis interkonsenton pri la spezkonto de la 63a UK.

141 voĉdonoj pri 60 artikoloj

LA MIRINDAĴO DE LUCERNO ne estis la akcepto de nova statutprojekto. La mirindaĵo estis tio, ke la Komitato de UEA sukcesis ne nur trabori sian tutan 46-punktan tagordon sed **ankaŭ** tralabori ĉiujn 60 artikolojn de la nova statuto de UEA — kaj ke ĝi povis fari tion detale, sisteme, demokrate kaj relative trankvile. La Asocio ankoraŭ ne havas novan statuton. Por tio necesas ankoraŭ Ĝenerala Voĉdono de la aliĝintaj landaj asocioj kaj de la individuaj membroj en landoj sen aliĝinta asocio. Tamen ĝi jam havas tre koheran statutprojekton, larĝe pridiskutitan inter la membroj kaj nemembroj de UEA, multfoje prifajlitajn kaj amenditan kaj fine akceptitan de la Komitato, ofte kun unuanimeco aŭ preskaŭa unuanimeco.

La fintrakto de la statutprojekto estis persona triumfo por Humphrey Tonkin. Ne li decidis, ke ni bezonas novan statuton. Tio jam fariĝis necesa pro novaj nederlandaj leĝoj pri asocioj — kaj el jura vidpunkto UEA estas nederlanda asocio. Tonkin vidis la ŝancon samtempe plibonigi la tutan statuton kaj ne nur fliki diversajn teknikajn postulojn de la novaj leĝoj sur la malnovan ŝtofon. Li mem pretigis kompletan novan projekton, mem gvidis la koncernan komisionon kaj ellaboris precizan kalendaron por ĉiuj ŝtupoj de la tuta proceduro ekde la unua publikigo tra publika diskuto ĝis fina notaria akto en 1980.

Tio neniel signifas, ke la nova statuto estas verko de Tonkin. Multaj el la tekstoj de li proponitaj estas for-

lasitaj aŭ draste modifitaj. Preskaŭ neniuj tekstoj el la projekto siatempe aperinta en "Esperanto" en decembro 1978 restis sen revizioj. Tonkin tamen estas tiu, kiu **ebbligis** al la Asocio reformuli en demokratia maniero siajn proprajn principojn. La procedura regularo, kiun Tonkin enkondukis en la Komitaton jam en 1975 kaj kiu post diversaj poluroj nun atingis definitivan formon, estis foje kritikita kiel tro mekanika aŭ eĉ primokita kiel manlevada gimnastiko ... sed en Lucerno ĝi pruviĝis unu el la plej valoraj kontribuoj al la Asocio de la nuna prezidanto. La sukcesa pilotado de kvindek da diversopiniaj komitatanoj tra tuta arĥipelago da proponoj kaj amendoj, tra 141 apartaj voĉdonoj, al fina ĝenerala konsento pri ĉiuj 60 artikoloj de la nova statuto, ne estus ebla sen klara proceduro. Sub la ĝangalaj kondiĉoj, kiuj antaŭe regis en la decidaj organoj de UEA, ĝi estus neimagebla.

Statutoj ne estas la plej ekscita formo de legaĵo. Plejparte, iliaj paragrafoj servas unuavice por gvidi la funkciulojn kaj administrantojn kaj nur escepte interesas la ĝeneralan membraron. Ĉi tie ni do raportos nur pri la pli vaste interesaj eroj: la demando pri neŭtraleco, la reprezentiĝo de la membroj, la povoj de la gvidantoj, la lingvo...

Jes, la lingvo. Oni rajtas demandi sin, ĉu ne estas memkompreneble, ke la oficiala lingvo de Universala Esperanto-Asocio estas Esperanto. Tamen, kia Esperanto? Pri tio precipe niaj redaktoroj ofte bezonas gvidlinion.

Novaj honoraj membroj de UEA



Hideo Shinoda



Emilija Lapenna

S-ino Emilija Lapenna jam pli ol 25 jarojn plenumas unu el la plej laborigaj movadaj oficoj — tiun de la ĉefdelegito de UEA en Jugoslavio. Ŝia Esperanto-agado kultura estas same elstara, ĉu kiel esperantlingva redaktoro de Radio Zagreb, ĉu kiel aŭtoro de dramaj tekstoj (*Nova teatro*, 1974), ĉu kiel unu el la plej aktivaj recenzantoj. De 1965 ĝis 1974, ŝi estis sekretario de la Belartaj Konkursoj. Kaj ekde sia esperantistiĝo en 1931, ŝi estas aktiva en la landa kaj loka Movado, kie ŝi ankoraŭ plenumadas gravajn taskojn kaj okupas elstarajn funkciojn.

D-ro Hideo Shinoda per siaj laboroj kaj mecenata subteno faras la medicinon unu el la plej evoluantaj kampoj de la faka agado per la Internacia Lingvo. En 1955 li prelegis en Esperanto en pluraj eŭropaj universitatoj pri kancer-operacioj. Al *Medicina internacia revuo* li kontribuis plurajn originalajn studojn, kaj li subtenadas la nivelon de medicinaj studoj en Esperanto ankaŭ per la ĉiujara premio de Universala Medicina Esperanto-Asocio, kies honora prezidanto li estas. D-ro Shinoda estas konsilanto de Japana Esperanto-Instituto kaj ĉefdelegito de UEA en Japanio.

La nova teksto, bazita sur propono de prof. Waringhien, estas:

6. **Lingvo.** La oficiala lingvo de UEA estas la Internacia Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de ĝia iniciatinto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvo-uzo kontrolita de la Akademio de Esperanto.

Tiu vortumo forigas la malklarecon de la malnova teksto kaj per la vortoj "ĝenerala lingvouzo" unuafoje permesas, ke ne nur la skriba verkaro sed ankaŭ la **parola** uzo ludu rolon en la difino — dum aliflanke la lastaj vortoj bremsas tro liberan interpreton. (Notindas, tamen, ke multaj trovas nenecesa difini la lingvon pli precize. Propono forstreki ĉion post la vortoj "Internacia Lingvo Esperanto" malvenkis per nur 2 voĉoj.)

Limigo de la povoj de la gvidantoj estas grava trajto de la nova projekto. Pluraj ŝanĝoj servas por plifortigi la rolon de la Estraro kiel kolektivo kaj ebligas pli libere disdividi la taskojn inter la estraranoj. Ne plu la Ĝenerala Sekretario estas devige ŝargata per la monda informado pri Esperanto kaj la eksteraj rilatoj de la Asocio, sed tiujn taskojn povas ricevi alia estrarano. Estas forigita la ofte pridisputita frazo, laŭ kiu "La Ĝenerala Sekretario povas ricevi kompenson" pro sia laboro. Ne plu la Prezidanto "kontrolas aŭ kontroligas la oficejojn" paralele kun la kontrolo de la komitatanoj nomitaj por tio. Ne plu aperas la frazo, laŭ kiu "En esceptaj okazoj" la Prezidanto "havas la povon de la Estraro aŭ de la Komitato" — povo tro facile misuzebila. Eble plej grave, "Prezidanto ne rajtas ofici dum pli ol du sinsekvaj oficperiodoj". Por tiu nova statuta limigo plej forte batalis ĝuste la nuna prezidanto mem, konvinke argumentante, ke tio necesas por sekurigi la alfluon de novaj talentoj al la pintaj organoj de la Asocio. Kompreneble, tiu regulo ne malhelpas sed ĝuste plifaciligas, ke prezidanto poste restu en la Estraro en alia funkcio.

La reprezentiĝo de la membroj en la gvidaj organoj estas aparte komplikita afero ĉe UEA, kiu konsistas parte el individuaj membroj kaj parte el landaj kaj

fakaj asocioj. Laŭ la nova statuto, ĉiuj individuaj membroj (antaŭe nur la delegitoj) rajtas proponi komitatanojn "B" kaj voĉdoni pri ili, kaj ĉiuj individuaj membroj (antaŭe nur tiuj en landoj sen aliĝinta landa asocio) balotos en Ĝenerala Voĉdono. Nova regulo limigas la nombron de komitatanoj "A" nomataj de unu landa asocio al ses kaj malhelpas, ke tre grandaj landaj asocioj dominu la Komitaton. Malgrandaj landaj asocioj rajtas nomi nur observanton en la Komitato (sen voĉdonrajto), sed laŭ la nova statuto tiuj observantoj inter si elektos unu komitatano, tiel ke la malgrandaj movadoj tamen havu voĉon. Fine, ankaŭ la Junulara Sekcio TEJO enskribiĝis en la novan statuton kaj rajtas mem nomi komitatano de UEA.

La difino de la neŭtraleco de UEA estis la centro de multaj ŝtormoj kirliĝintaj tra la historio de la Asocio. Ankaŭ nun la plej akraj kritikoj kontraŭ la pasintjara projekto tuŝis ĝuste tiun temon. Des pli interese estis, do, ke la fina vortumo de la paragrafo 5, "Neŭtraleco", estis akceptita **unuanime**:

UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.

Komparo kun la malnova teksto montras tri ĉefajn diferencojn. Unue, estas unuafoje klare skribite, ke UEA **ne** estas neŭtrala rilate la lingvan problemon en internaciaj rilatoj. Samtempe — kaj tio estas tre grava — tiu deklaro implicas, ke UEA **ja** estas neŭtrala rilate ĉiujn aliajn lingvajn problemojn. Due, aldoniĝis frazo por klarigi, kion en la praktiko signifas tiu neŭtraleco ("UEA ne prenas starpunkton"). Trie, la deklaro pri la homaj rajtoj estas plifortigita kaj precizigita.

Ankaŭ la diskuto pri la aliĝkondiĉoj por landaj asocioj estas forte ligita kun la difino de neŭtraleco. Laŭ la malnova statuto, landa asocio povas aliĝi, "se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de par. 4." Tamen ne ĉiuj landaj asocioj — eĉ ne tiuj, kiuj antaŭ jardekoj aliĝis al UEA — havas en sia statuto eksplacitan deklaron pri neŭtraleco, kaj en la praktiko sufiĉis, se **ne** aperis en la statuto io klare **ne**-neŭtrala. La nova teksto akceptita en Lucerno forigas tiun postulon, ke la landa asocio estu mem laŭstatute neŭtrala, sed aliflanke starigas al ĝi multe pli specifajn kondiĉojn:

ke ĝi estas asocio laŭorde organizita kaj vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno aŭ pro raso, lingvo aŭ sekso, kaj ke ĝi skribas konfirmasian pretecon respekti la Statuton kaj regulojn de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon.

Krome, ne sufiĉas unufoja deklaro:

Kondiĉo por daŭra aliĝinteco estas, ke la Komitato restas kontenta pri plenumo de la jam difinitaj kondiĉoj kaj deklaro.

La fina teksto de tiu tuta paragrafo 13 estis akceptita kun nur 1 voĉo kontraŭa kaj 1 sindeteno.

Victor Sadler



Foto: Z. Nikolov

Pli grava rolo por la individua membraro: La publiko tre atente sekvis la statutan debaton en la Komitato.

Dek unu prelegoj en kvar tagoj

32a sesio de ISU en la 64a UK, tio atentigas pri la longeco de ĉi tiu tradicia scienca sekcio de la kongresa programo. Pri ISU en Lucerno okupiĝis ankaŭ komisiona kunsido, i.a. pro tio, ke antaŭ la kongreso en Brazilo (1981) komencas ĝeni la vorto "somera", ĉar la kongreso en Brazilio okazos meze de sudhemisfera vintro. Jes, oni adaptu la nomon sed klopodu respekti la tradicion, ĉar ni ne havas abundon da aferoj, kiuj sukcese daŭras 32 jarojn. En Lucerno 11 prelegoj estis tro por kvar efektivaj labortagoj de la Kongreso. Oni tute forgesis la belan iniciaton pri kolokvoj (kiel en Kopenhago kaj Ateno). Kial? Malpli da prelegoj estonte, kaj pli da tempo por postprelegaj diskutoj kaj kolokvoj! Inter la 11 lucernaj prelegintoj almenaŭ duono unufoje lektiis en ISU. Tiu tendenco estas subteninda ankaŭ estonte.

LA ĈI-JARA (32a) sesio de Internacia Somera Universitato (ISU) prezentis al la publiko 11 prelegojn el diversaj sferoj: juro, socilingvistiko, elektroniko, beleto, scienca informado, biologio, komputila tekniko, pedagogio. ISU funkciis sub la rektoreco de mag. Claude Piron, dank' al kiu estis severe respektataj tempolimoj kaj la diskutoj estis tre viglaj.

La prelegon de d-rino Flóra Szabó-Felső (Hungario), "Jura trakto de infanoj, naskitaj ekster geedzeco", aŭskultis ĉ. cent personoj. Estis donita vasta historia superigardo laŭlanda, ĝis la nuntempo, kiam formale la statuso de ĉiuj infanoj en multaj landoj estas egala, kvankam diferencoj de lando al lando ankoraŭ restas. Konservativeco de la publika opinio kaj aliaj aspektoj de la problemo ofte rezultigas, ke infano naskita ekster geedzeco venas en la mondon kun konsiderinda malavantaĝo, tiel morala, kiel ekonomia. Temas ankaŭ pri diversaj formoj de la rekono de patreco.

Inĝ. Jan Otto de Kat (Nederlando) prelegis pri "Nova evoluo pri ciklotronoj en la Teknologia Universitato de Delft". La prelego rilatis la efektivigitan eblecon konduki jonojn de ekstere, tra la meza ebena de magnetkampo, al la centro de la maŝino. Tio sekvigis relativan malgrandiĝon de la ciklotrono, kun samtempa plifortiĝo de la fasko-intenseco.

En la prelego de Vilmos Benczik (Hungario) temis pri "Rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de la orienteŭropaj nacioj". Sur larĝa historia fono estis prezentita ofte simila sorto de orienteŭropaj popoloj, kies nacia konscio esprimiĝis unuavice en la evoluigo de lingvo kaj literaturo. Tiu simileco estas ĉefe tipologia. Ĉar Esperanto aperis kaj certgrade evoluis en la

orienta Eŭropo, ankaŭ ĝi kaj ĝia literaturo estis forte influitaj de tiuj orienteŭropaj kondiĉoj. La spirito de la prelego estis proksima al tiu de la libro de Beekman *Lumo de orienta Eŭropo*, kiu asertis i.a., ke Esperanto ne hazarde aperis ĝuste en tiu mondparto.

Tom Arbo Høeg (Norvegio) komencis sian prelegon "Pri sklaveco laŭ antikvaj leĝoj" per versoj, kiuj emfazis gravegan signifon de la sklavoj en la evoluo de la homa civilizo. Oni povis aŭdi tre detalan pritrakton de la vivkondiĉoj de sklavoj en diversaj landoj, kun oftaj citaĵoj el antikvaj leĝoj kaj aliaj historiaj fontoj. Sklaveco estis produkto de ekonomia evoluo, ĝi aperis kune kun la privata proprieto. Nuntempe, kiam la sklaveco formale ne ekzistas, oni tamen povas aŭdi pri fakta sklaveco en kelkaj landoj. La prelego elvokis viglan diskuton pri la temo.

Inĝ. Hans Joachim Plehn (Aŭstrio) traktis la temon "La tuteŭropa patento kaj lingva problemo". Plehn, kiu



dum jardekoj laboris kun E. Wüster, emfazis, ke necesas granda fortostreĉo por leĝigi patenton samtempe en pluraj ŝtatoj, ĉar ekspertoj en ĉiu el la ŝtatoj devas ekzameni la patenton kaj do refoje kaj denove plenumi la saman laboron faritan jam komence en la lando de la patentorigino. Por superi tiujn problemojn, pasintjare fondiĝis Eŭropa Patent-Oficejo, kiu laboras trilingve, sed faras esceptojn pri patentoj, kiuj originas en unu el la dek ŝtatoj-membroj. Sekve, la nova internacia organizaĵo spertas la tutan komplikecon de la lingva problemo, kutima en la nuntempa internacia vivo. La prelego de d-ro Ralph A. Lewin (Usono), "La mistera kazo de la verdiĝintaj ursoj", estis bona ekzemplo pri populara prezento de nova scienca materialo. Sovagaj arktaĵoj, kutime neĝblankaj, en la Zoologia Ĝardeno de San Diego (Usono) ĉiusomere verdiĝas. Esploroj montris, ke la fenomenon kaŭzis bluverdaj algoj (cianoficeoj), kiuj post rompo de la harpinto invadis la internon de la ursaj haroj kaj ekloĝis tie, bone nutritaj kaj bone protektitaj kontraŭ formanĝo fare de aliaj mikroorganismoj. La prelego estis ilustrita per lumbildoj, foto- kaj elektronaj mikro-grafaĵoj. Prof. d-ro Carl Støp-Bowitz (Norvegio) prelegis pri "Prizorgado de la idoj ĉe bestoj". Raportitaj faktoj,

ilustritaj per multaj desegnaĵoj, montris, ke pli aŭ malpli aktiva prizorgado de la idoj evidentigas eĉ ĉe la mal-supraj organismoj. La aŭskultantaro ricevis vastan superrigardon pri la diversaj formoj de la prizorgado: evoluo de apartaj organoj por flegi la idaron, konstruado de nestoj, nutraĵprovizado, prizorgo de ovoj, protektado kaj nutrado de la idoj. Interesaj estis la faktoj pri la grava rolo de patroj ĉi-rilate ĉe kelkaj bestoj.

Inĝ. Christian Bertin (Francio) parolis pri "Konvertilo por konekto al X25a datenreto", mikrokomputoro konstruita laŭ iniciato de Konsulta Komitato Internacia en Telegrafio kaj Telefonio. La aparato estas aparte utila por telefona transdono de datenoj (= informoj; informeroj).

"La intelekta kapablo de la delfenoj" estis prelegtemo de d-ro Wim M.A. de Smet (Belgio). Rezulte de la intensaj observado kaj esplorado, aperis multaj tekstoj pri ĉi tiu temo, sed pluraj el ili ne tre kritike interpretas la esplorrezultojn. Klariĝis intertempe, ke la delfenoj ne komunikas inter si INTEKTE kaj ke ili ne uzas "lingvon". Eĉ la plej sensaciaj kazoj de delfena konduto povas esti klarigitaj sen la supozo, ke la delfenoj posedas kvazaŭ homan intelekton. La preleganto aparte atentigis pri la granda kontribuo de Svislando en la ĉi-rilataj esploroj.

Viglan diskuton elvokis la prelego de prof. Helmar Frank (FR Germanio) "La influo de la Internacia Lingvo al la lerneja sukceso". La ideo mem ne estas fremda al esperantistoj, sed la preleganto per skrupula, science bazita esploro montris netan influon de la antaŭa lernado de Esperanto al la lernosukceso ĉe la gepatra kaj fremda lingvoj, geografio kaj eventuale ankaŭ matematiko. Estas dezirinde, ke la rezultoj de tiuj esploroj iĝu akireblaj al ĉiuj, kiuj klopodas pri la enkonduko de lingvo-orientiga instruado en diversaj landoj.

Prof. d-ro Mahomet Isaev (Soveta Unio) ne estis inter la anoncitaj prelegantoj en ISU kaj pretigis sian prelegon dum kelkaj kongresaj tagoj. Ĝia titolo estis "Lingvaj problemoj en la multnacia Soveta Unio kaj Esperanto". Isaev bildigis la ekstreme buntan lingvan mapon de Soveta Unio, atentigis pri la socie grava rolo kaj funkciado de la interpopola (enlanda) lingvo, prezentis la efektivigmanieron de la solvo de tiu ĉi kompleksa demando, faris superrigardon de la teorioj pri la universala lingvo de estonteco, atentigis pri kelkaj terminologiaj difinoj kaj informis pri esperantologia laboro en Soveta Unio, samkiel pri la enlanda Esperanto-Movado.

Boris Kolker


CED KAJ ESPERANTOLOGIO:

Por pli aktiva kunordiga rolo

EN DU KUNSIDOJ ambaŭ sub la gvido de d-ro U. Lins, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) en Lucerno ree inventaris la problemaron sur ĉi tiu grava laborkampo. Enkonduke al la unua kunsido Lins, unu el la tri estraranoj de CED, klopodis difini la agadsferon de CED per atentigo, ke ĝi okupiĝas pri 1) studo de la monda lingvo-problemo, 2) interlingvistiko kaj 3) esperantologio. Laŭ li, CED devus servi kiel kunordiganto de la laboroj tiurilataj. D-ro D. Blanke, alia ĉeestanta estrarano de CED, forte emfazis la strategian gravecon de la esperantologiaj esploroj por la tuta movada aktiveco, precipe tiu ĝia parto, kiu estas direktita eksteren. Pluraj diskutantoj (Bagger, Barandowska, Verloren van Themaat, Tautorat, Clerici, Tyblewski, De Smet, Sadler, Kolker, Ĉolić, Triolle, Jermář k.a.) menciis temojn aŭ esplorkampojn, kiuj devus interesi CED. Kelkaj demandoj ligiĝis al la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*; aŭdiĝis rimarkoj pri mankoj en la dokumentado kaj statistikado; menciigis esplorkampoj kaj aranĝoj (en Hungario, Germana DR, Soveta Unio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, FR Germanio), kiujn CED nur konstatas anstataŭ pli aktive roli en aŭ ĉirkaŭ ili. Kvankam pluraj projektoj (bibliografio de vortaroj, enciklopedio) estas daŭre prilaborataj, trudiĝas kon-

stato, ke la agado de CED nur malforte sentiĝas en la Movado kaj ke oni sen ĉi tiaj kunsidoj en la kongresoj facile povus eĉ forgesi pri la ekzisto de CED. Kun *Esperanto-dokumentoj* (anstataŭ la iamaj CED-dokumentoj) nun ekster la laborkadro de CED, komencas manki ia daŭra vivsigno de ĉi tiu institucio. Tial aparte interesaj montriĝas deziresprimoj pri revivigo de la revuo *Esperantologio*. La organiza strukturo de CED restas svaga, kun adreso (tiu de la CO de UEA) kaj tri estraranoj en tri kontinentoj kiel la solaj konstantaĵoj. Tial oni ĉiam pli ofte ripetas la bezonon de aparta volontulo/oficisto, kiu prizorgus ankaŭ interkongresan funkciadon de CED.

Pasintjare en Bulgario, la unua esperantologia konferenco vekis multan intereson kaj havis riĉan (9 prelegoj) sed troŝtopitan programon. Ĉi-jare ripetiĝis nek la riĉo nek la intereso. Tri lucernajn sesiojn de la konferenco ĉeestis entute ĉ. 125 personoj, kiuj suferis en malkonvena salono. Marinko Gjivoje (Jugoslavio) kaj Claude Gacond (Svislando) parolis pri parencaj temoj, la unua ĝenerale pri la Esperanta literaturo en tutmondaj bibliotekoj, la dua specife pri Centro de Dokumentado kaj Studoj pri la Internacia Lingvo en La Chaux-de-Fonds. D-ro Detlev Blanke (Germana DR) traktis la temon "Motivado de la signifo de la Esperantaj leksemoj", kaj F. Lo Jacomo (Francio) enkondukis la temon "Kiel difini la lingvon Esperanto en la Statuto de UEA?". En ĉiuj tri sesioj la diskuto estis vigla kaj oni reemfazis la neceson daŭrigi la konferencojn ankaŭ dum la estontaj kongresoj. Por la venontjara konferenco en Stokholmo oni fiksas la temon "Sociaj aspektoj de la esperantologiaj esploroj".



”Nebuleta rivero”, la premiita (vidu ĉi-sube) foto de Lydia Vulliamy: Nia prestekniko neniel povas redoni la atmosferon de ĉi tiu, teknike perfekta, kolora foto. Ie en la foto, en la pejzaĝa horizonto, vibras ia varma fluido, kiu delikate — sed funde — homigas la senhoman vidaĵon.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1979:

Rezultoj

Konkursis entute 176 verkoj (poezio 48, prozo 23, teatraĵo 5, eseo 8, porinfana literaturo 39, fotografio 53), el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn:

POEZIO: Unua premio: **Eva Tófalvi** (Hungario) por *Omaĝe al Blaise Cendrars 1913*; Dua premio: **Albert Goodheir** (Britio) por *Odo al Delfoj*; Tria premio: **Mauro Nervi** (Italio) por *Laŭ simpla tono*; Laŭdaj mencioj: **Rejna de Jong** (Nederlando) por *Nekompreneo* kaj **Xu Daorong** (Ĉinio) por *Ĉina, ĉina...*

PROZO: Unua premio: Ne aljuĝita; Dua premio: **Mauro Nervi** (Italio) por *La tago kaj la nokto*; Tria premio: **V.A. Glazunov** (Soveta Unio) por *Bes Kunak*.

TEATRAĴO: Unua premio: Ne aljuĝita; Dua premio: **Bernard Golden** (Hungario) por *Pureco de sango*; Tria premio egale al **Stefan MacGill** (Nederlando) por *La psikologo sukcesas*, kaj **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por *En policejo*.

ESEO (Premio Luigi Minnaja): **Bernard Golden** (Hungario) por *La sŭahila lingvo kaj Esperanto*; Laŭda mencio: **Xu Daorong** (Ĉinio) por *Kiom da ĉina en Esperanto?*

PORINFANA LITERATURO (omaĝe al la Internacia Jaro de la Infano): Unua premio: **Zora Heide** (Svedio) por *La granda boleto*; Dua premio: **W.M. Smit** (Nederlando) por *Dolĉi Grum*; Tria premio: **Nevena Nedelĉeva** (Bulgario) por *Du leteroj*; Laŭda mencio: **Stefan MacGill** (Nederlando) por *La oficeja ĝangalo*.

NOVA TALENTO (Pokalo Harabaĝiu): **Rajna A. Konstantinova** (Bulgario) por la porinfana verko *Promeno en la infanecon*.

FOTOGRAFIO: Unua premio: **Lydia Vulliamy** (Britio) por *Nebuleta rivero*; Dua premio: **Stefan MacGill** (Nederlando) por *Tro por etulo*; Tria premio: **Jovan Oŝap** (Jugoslavio) por *Feliĉa infaneco*; Laŭdaj mencioj: **Jovan Oŝap** por *Esperantisto* kaj *Patra perspektivo*.

Pli detala raporto aperos en nia oktobra numero.

BELARTAJ KONKURSOJ 1979

Originala poezio; Unua premio:

OMAGE AL BLAISE CENDRARS 1913

Mi legas viajn poemojn amiko
kaj bruruliĝas ekspreso transsiberia
rulfaligas revojn kaj sopirojn
En ĝi — ankoraŭ dum tempo de paco —
soldatoj de l'sekvonta milito
kun kantoj sur lipoj
kun harmoniko sur ŝultroj
Kaj poste la batalo
la militpoŝtaj kartoj
En la sendaĵo de nekonata soldato
bildo de la hejmo laŭ imagoj
Kaj pli poste la hejmenigo
Kaj fine
La transformiĝo de la rememoroj
je artefarita piedo
je artefarita mano
je artefarita okulo
aŭ je bravula ordeno

Eva Tófalvi
(Hungario)

Bone kaj novstile

La Unua Ĝenerala Kunsido de UEA estis ĉi-jare iom pli interesa ol kutime. Al tio unuavice kontribuis novstila pritrakto de la Estrara Raporto. Antaŭe la raporton prezentis al la publiko plej ofte la ĝenerala sekretario de UEA. Ĉi-jare la ĉefa raportanto pri la Raporto estis ne-estrarano, d-ro Detlev Blanke. Tio helpis ricevi kvazaŭ ian objektivan recenzon de la jara resumo pri la laboro de UEA. Tio direktis ankaŭ la diskuton, kiu tamen ne estis aparte vigla, al pli esencaj demandoj ol kutime (edukado de la membroj, strategia graveco de esperantologio, rolo de CED, taŭgeco de la organizaj strukturoj, enhavo de ĉi tiu revuo ktp). Diskutiĝis ankaŭ aliaj temoj: elekto de delegitoj, Societo Zamenhof, spezoj de la pasintjara UK, Internacia Ekzameno, Belartaj Konkursoj, informa materialo. Kvankam la ideo pri eksterestrara recenzanto estis nur eksperimento, verŝajne tre utilis daŭrigi tian manieron de la kongresa traktado de la Estrara Raporto. Gravecon al la Unua Ĝenerala Kunsido donis ankaŭ la tiea elpaŝo de ambasadoro Omar Muntasser, konstanta reprezentanto en Ĝenevo de Organizo de Afrika Unueco, kiu anstataŭigis inaŭguran ĉeeston per tuttaga sperto de la Kongreso kaj partopreno en ĝiaj laborkunsidoj.

La Dua Ĝenerala Kunsido, tradicie dediĉita al la kongresa ĉeftemo, estis aparte sukcesa en Lucerno. Ĝi

komenciĝis per tre vigla diskuto (dudeko da partoprenantoj) pri la Kongresa Rezolucio (vidu p. 146). La podia diskuto, kiun poste gvidis d-ro Corsetti, traktis la ĉeftemon de la Kongreso — "La lingva aspekto de internacia organiziĝo". La diskuton partoprenis: E. Barát (hungara parlamentano kaj vicprezidanto de HEA), S. Chaves (profesoro pri komunikado kaj prezidanto de Brazila E-Ligo), Liu Ling (redakciano de *El popola Ĉinio*), B. Moon (funkciulo en la Traduka Servo de Eŭropa Komisiono), C. Piron, H. Tonkin, kaj devis partopreni ankaŭ prof. M. Isaev, sed li ne sukcesis liberiĝi de aliaj kongresaj okupoj. Eĉ pli interesa ol tiu podia diskuto estis la pli frua traktado de la ĉeftemo tra la kongresa semajno. Tio aparte validas por la publika diskuto okazinta jam en lundo la 30a de julio (la Ĝenerala Kunsido okazis en vendredo la 3a de aŭgusto), kiun partoprenis pluraj elstaraj gastoj. Inter ili estis ambasadoro Omar Muntasser de Organizo de Afrika Unueco, Frank Field, kiu estas ĝenerala sekretario de Monda Federacio de la Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj, Guy Marchand (funkciulo de Kongreso de Mondcivitanoj) kaj pluraj elstaraj esperantistoj, inter ili ankaŭ S. Simeonov, funkciulo de Internacia Normiga Organizo en Ĝenevo. La esencon de ĉiuj ĉi diskutoj grandparte resumas la Kongresa Rezolucio, kiu devus fariĝi kerno de estonta eldonaĵo pri la ĉi-jara kongresa ĉeftemo. Tiu eldonaĵo, same kiel la Rezolucio mem, ĉefe direktiĝos al ekstermovadaj instancoj. Tamen, ĝi havas ankaŭ movadan gravecon, ĉar ĝi servas kiel strategia vojmontrilo por la ĝenerala ekstera aktiveco de la Esperanto-movado.

Kelklinie pri ...

DOKUMENTUJO: Ĝi estis tute specife riĉa ĉi-jare. Apud la kutima svarmo da turismaj prospektoj kaj alispekaj informiloj, elstaris speciala numero de *Hungara vivo*, 168-paĝa libro *La fenomeno Svislando* de A. Baur, 24-paĝa kolora prospekto pri Svislando, urbo-plano, notlibro, globskribilo ktp. Dum multaj jaroj la kongresanoj ne ricevis tiel ampleksan informaron pri la kongresa lando. Gratulinde!

EKSKURSOJ: Vendiĝis pli da ekskursaj biletoj ol da kongresanoj venis al Lucerno. Oni notis 1340 partoprenojn en ses diversdirektaj ekskursoj kaj en la 5-taga Postkongreso en Interlaken (114 personoj). Al tio aldoniĝas 486 partoprenoj en la urba rondveturo. Ĉiuj kongresaj fakoj bone funkciis sed la ekskursa fako pleje proksimiĝis al perfekteco. Kontribuis tiurilate eĉ la vetero, kiu dum la tuta kongresa semajno estis bela kaj suna, okaze eĉ tro varma, kun unu-dufoje pluveto por refreŝiĝo.

AKCEPTOJ: Okazis la kutima akcepto por la diplomatoj kaj aliaj honoraj gastoj. La urbestro invitis ĉ. 200 gekongresanojn; la prezidanto de UEA bonvenigis la membrojn de Societo Zamenhof al speciala akcepto, kion faris ankaŭ la eldonistoj Kehlet kaj Régulo-Pérez por la amikoj de la eldonejo TK/Stafeto.

INFANOJ: Mankis nur Afriko por ke en la 17a Internacia Infana Kongreseto estu reprezentitaj ĉiuj kontinentoj. Kvankam estis tie nur 24 infanoj kaj 4 gvidantoj, kune el 12 landoj, la Kongreseto estis pli internacia kaj pli sukcesa ol dum multaj pasintaj jaroj. Forte



impresis la lingva nivelo de la kongresetanoj. Kun aparta kaj tre riĉa programo, en preskaŭ perfektaj ejoj, la Kongreseto akcentis la neceson daŭrigi ĉi tiun belan tradicion kaj eviti plurjarajn paŭzojn en la organizo de tiu unika infana aranĝo.

Al la infanoj dediĉiĝis ankaŭ aliaj kongresaj programeroj: prelego en ISU (vidu p. 151) kaj tre sukcesa foto-

ekspozicio "Infanoj de la suno" de Zdravko Nikolov (Bulgario).

LIBROSERVO: Ĝi estis la unua supermarkto en la historio de la Universalaj Kongresoj. Kun preskaŭ ok mil ekzempleroj de pli ol 750 elektitaj titoloj, ĝi estis ne malpli sukcesa ekspozicio ol vendejo. La surlokaj vendoj superis la sumon de 35 000 guldenoj.

FAKAJ KAJ ALIAJ KUNSIDOJ: Deko da akademianoj diskutis baldaŭan elekton de sia nova estraro kaj malaprobis lastatempajn ortografiajn reformproponojn. La unua oficiala kunveno de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj prezentis sian ĝisnunan laboron (ĉefe pri la katalunoj) kaj decidis en 1980 koncentri la agadon al la bretona etno de Francio. UMEA-premion ĉi-jare ricevis d-roj Jean-Luc Tortel kaj Lajos Molnár. Teknika glateco karakterizis la kunvenon de Oomoto (lumbildoj kaj malnova japana muziko). Prelegon de Budhana Ligo Esperantista sekvis debato kun katolikaj pastroj kaj bahaanoj. Delegitoj de UEA kunsidis – kaj kunstaris – en tro malgranda salono (la oficejo de KKS) por diskuti i.a. la neceson pli zorge kontroli la kompetentecon de fakdelegitoj. Kunvenis ĉ. dudek aliaj fakaj grupoj de profesia, hobia, politika aŭ religia karaktero, kaj okazis publikaj kunsidoj de UEA pri agado eŭropa, financa, kultura, landa, parlamenta kaj sporta, samkiel pri la agado ĉe UN kaj OAS.

GAZETARA SERVO: Sub la gvido de d-ro Arthur Baur, kun helpo de Elsbeth Bormann kaj aliaj, ĝi koncentriĝis al la nacia gazetaro (ĉefe germanlingva). Tio rezultigis dekojn da artikoloj pri la Kongreso aŭ lige al ĝi. Aperis informoj ankaŭ en televido kaj radio. Montriĝis, ke la kongresanoj ankoraŭ malfacile digestas la mankon de la Esperantaj gazetaraj komunikoj, kies plena malapero neniam estis tio, kion oni volis atingi.

JUNULARAJ ARANĜOJ: TEJO varbis apogon per sinprezenta kunsido kaj aparta ĝiceto. Junaj kongresanoj surloke produktis kaj disdonis milojn da kvinlingvaj informiloj por la partoprenantoj de la festivalo "Europa cantat". Junulara vespero allogis kvindek da personoj, dum la TEJO-debato pri la aserto "ke post dek jaroj Esperanto estos iugrada laborlingvo de UN" interesis centon da kongresanoj kaj provokis viglan diskuton.

KONGRESA KURIERO: Unuafoje ĝi estis presita, dank' al LKK-ano Johann Lutz. Aperis 7 numeroj. Redaktis Thomas Bormann, kiun por la unua numero anstataŭis G. Winkler kaj F. Hilpert. Nun la kuriero trovis taŭgan formon, sed tion oni ne povus diri pri ĝia enhavo, kiun lertaj kongresanoj ofte eluzis por senpaga reklamado de siaj eldonaĵoj kaj iniciatoj.

VIRINA AGADO: Komisiono pri Virina Agado aranĝis tri prelegojn: J. Tonkin sprite rakontis pri la unuaj alpistinoj, C. Nourmont-Moon prelegis pri la okcident-eŭropaj virinoj en la mezepoko, dum T. Peter-Rüetschi traktis la vivon de la svisa pedagogo Pestalozzi (1746-1827). Publika kunsido montris fortan malsamecon de la opinioj pri la celoj de la Komisiono. Alia kunveno

traktis la projekton de novaĵletero pri seksa egaleco. Elektiĝis nova Komisiono: A. Brennan, L. Demmen-daal kaj F. Szabó-Felső.

BALO KAJ BANKEDO: Bankedo estis senriproĉa, dum la Balo emfazis la limigitan kapaciton de la ĉefa kongresa salono. LKK konsciis pri tio kaj klopodis dividi la kongresanaron en du salonojn, kun diversstila muziko, sed tio ne multe efikis. Tamen, poste kreiĝis bona etoso kaj la Balo etendiĝis ĝis la 2a horo matene.

FILMPROGRAMO: Simile al kelkaj aliaj kongresaj aranĝoj, ĉi tiun karakterizis manko de kohereco. Plej bone aranĝita estis lumbilda prezento de la venontjara kongresurbo Stokholmo. Filmo pri la UK en Varno altiris grandan atenton, sed suferis de redaktaj kaj teknikaj problemoj. Lumbildaro pri la mondvojaĝoj de Tibor Sekelj montriĝis, kvankam interesa, tro ampleksa por la disponebla tempo. La programon eniris ankaŭ turismaj filmoj nacilingvaj.

DISERVO: Kvankam oni spertis iom da organizaj problemoj ĉi-rilate (antaŭ la Kongreso), la Ekumena Diservo en la lucerna katedralo altiris pli ol 800 homojn. En Lucerno kaj Lokarno (kelkajn tagojn pli frue dum la tiea ILEI-konferenco) kolektiĝis 1700,00 guldenoj, el kio duono iris al la brazila komunumo "Bona Espero", kaj duono al la Agado E3 (vidu nian numeron de julio-aŭgusto, p. 128).

SOLENA FERMO:

Trofeo por belgoj

POST la kutima resumo de la kongresaj laboroj kaj prezento de la Kongresa Rezolucio, ambaŭ fare de d-ro W. Bormann, ĝenerala sekretario de UEA, aŭdiĝis pliaj skribaj salutoj. Inter ili estis ankaŭ tiuj de la ĝenerala direktoro de Internacia Labor-Organizo, Centra Oficejo de Internacia Fervoja Transporto, Ambasadado de Centra Afrika Imperio kaj honora membro Vilho Setälä. Al la anonco pri la rezultoj de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj aldoniĝis informo pri franclingva traduk-konkurso. U. Grattapaglia, estrarano pri landa agado, anoncis la aljuĝon de la Trofeo Fyne al Belga Esperanto-Federacio, ĉefe pro la lastatempa kresko de la individua membraro kaj pro la funkciigo de Grafika Centro de UEA en tiu lando. La kongresanaro aklame salutis la novajn honorajn membrojn de UEA – Emilija Lapenna kaj Hideo Shinoda (vidu p. 149). Longa listo de dankoj kaj surpodiigo de la tuta Loka Kongresa Komitato antaŭis la tradician transprenon de la granda kongresa flago, kiu ĉi-foje vojaĝos al la sveda ĉefurbo, gastigonto de la 65a UK en 1980. En siaj finaj vortoj Tonkin provis taŭge epiteti la Kongreson en Lucerno kaj nomis ĝin i.a. labora kongreso. Tio certe estas trafa resumo ne nur de la kongresa semajno mem sed ankaŭ de la tuta amaso da organizaj kaj aliaj problemoj, kiujn la lucerna LKK tiel sukcese solvis. La himno en la fino sonis ĉi-jare tre impone kaj aparte solene, apogita de la granda kongreseja orgeno.

Riĉo kaj ĝiaj malvirtoj

SE EN SES TAGOJ okazas 14 memstaraj artaj aranĝoj, oni emas demandi sin, ĉu temas pri kongreso aŭ pri arta festivalo. Malfacilas memori Universalan Kongreson kun tiel riĉa arta programo kiel en Lucerno.

Abundis precipe muziko, instrumenta kaj voĉa, tiel ke profesia muzikisto sugestis epiteto la tutan lucernan Kongreson "muzika". En tia kvanto, ankaŭ la kvalito de la muzikaj aranĝoj estis ĝenerale altnivela kaj alloga.

Svisa Vespero: La Kongreso aĉetis biletojn por svisa folkloro vespero, okazinta en la kadro de la muzika festivalo "Europa Cantat 7", kiu kun siaj miloj da artistoj kaj ĉeestantoj preskaŭ plene samtempis la 64an UK. La kongresanoj estis nur parto de la publiko en la granda kermeseca festhalo de Lucerno. Tio estis bela kaj homogena programo, multilate surprize informas pri nekonataj trajtoj de la svisa folkloro, ĉio en moderna aranĝo sed kun respekto de la originalo kaj nur foja proksimiĝo al spektakla kiĉo (tiuj "dancantaj kristnaskaj arboj", ekzemple). Bonvena estis ankaŭ la Esperanta programgvidado (iom diletanta), kiu el la tuto faris kvazaŭ propagandan vesperon, ĉar unuflanke estis la kvindeknaŭa kongresa publiko kun unu lingvo, kaj aliflanke kelknaŭa festivala publiko, kiu bezonis kelkajn lingvojn por informiĝi pri la programo. Antaŭ tiu vespero en Lucerno ni sciis multe malpli pri la svisoj kaj supozis, ke ili kapablas nur jodli.

Recitaloj kaj koncertoj: Okazis minimume ses tiaj aranĝoj tra la kongresa semajno, ekster la grandaj vesperaj artaj aranĝoj. **Galja Kostova-Toteva** (Bulgario), kun akompano de D. Béguin, prezentigis per nekutime potenca voĉo en opereca stilo, je profesia muzika nivelo. **Vintra vojaĝo** de Franz Schubert (teksto de W. Müller en ekzemplodone flua traduko de Madeleine

Stakian-Vuille) montriĝis esti unu el la plej altnivelaj artaj programoj de la Kongreso. Tion oni unuavice dankas al la basa voĉo de Fred Stachel kaj pianistino Anne-Laure Lepetit. Por kuraĝigi similajn laborinvestojn estonte, necesus nun inviti la interpretantojn de *Vintra vojaĝo* ankaŭ al kelkaj aliaj movadaj aranĝoj. **David Hill**, kiun ni jam de pluraj jaroj konas kiel akompananton kaj ĉefan animanton de la artaj aranĝoj en la kongresoj, ankaŭ en Lucerno rolis pluroble. Li orgenludis en la inaŭgura kaj ferma solenaĵoj, akompanis dum koncertoj de aliaj artistoj kaj mem koncertis per impona triklavara kaj pedala orgeno, kiu estas la ĉefa ornamaĵo de la granda kongreseja salono. En Lucerno la plimulto de la kongresanoj konstatis (kelkiuj rimarkis tion jam en Rejkjaviko antaŭ du jaroj), ke orgenmuziko estas la ĉeftraĵo de la muzikista profilo de Hill. **Danielle Béguin**, tiu kaprica kaj petola svisa terglobo, ludis harpon kaj fortepianon, akompanis kantistojn kaj solkoncertis minimume dufoje. Fakte, ŝia nekonformisma personeco kreis el ĉiu provludo (ie ajn en salonoj aŭ koridoroj) novan koncerton. Iuj opinias la malŝablonecon de Béguin ĝena, dum aliaj — ni apogu ĝuste tiujn — vidas en tio gravan komponanton de la artisma figuro de Danielle, kiu malmisterigas la koncertan muzikon kaj grave kontribuas al ĝia penetro en la publikon mem. Ni antaŭvidu novajn renkontiĝojn kun la neantaŭvidebla Danielle Béguin. **Bożena Zborowska** (Pollando) havas eksterordinare facilan voĉan teknikon kaj sukcesis tute kapti la publikon, precipe per la brileco de siaj leĝeraj koloraturaj



pecoj. **Veselin Damjanov** prezentigis kiel suverena reganto de la movada muzika scenejo. Lia programo estis prezentita per ege muzikeca kaj sentema kantarto, kun kristale klara elparolo. Li gajnas ankaŭ paradoksan pluson pro majstra prezento de pluraj muzike senvaloraj pecoj. Superbaj voĉo kaj talento, se nur li uzus ilin por la plej bona muziko... **Prodan Prodanov** (Bulgario) estis nova vizaĝo kaj nova voĉo, tenoro belsona, sed foje pena. Lia repertuaro estas grandparte eksmoda kaj enhavas sensencaĵojn ("Bonan venon", ekzemple).

Distra vespero: Kvankam ĝi estis malfacile digestebla konglomeraĵo de kantado, instrumenta muziko, deklamado, magiaĵoj ktp., ĝia ĉefa manko estis kompleta

BELARTAJ KONKURSOJ 1979 Originala poezio; Tria premio:

LAŬ SIMPLA TONO

Ne perdiĝu, mi petas,
en viaj ombraj katedraloj,
kie la eĥo de krientaj voĉoj
svenas rapide;
sed ĉi tie, apudmare,
mi aŭdos viajn vortojn serenajn,
kvazaŭ simplan kontrapunkton
de l'memoro,
aŭ disondon de viaj lumaj revoj.

Mauro Nervi
(Italio)

foresto de reĝisora koncepto, tiel ke ĝi "malbone komenciĝis kaj fiaske finiĝis", kiel diras unu el la spektantoj. **Olivier Tzaut** (Svislando) kaj **Danielle Béguin**, parte ankaŭ **Alberta Casey** (Usono), klopodis per siaj talentoj doni la bazan tonon al la programo. Ankaŭ la junaj violonistoj **Thomas Kleemann** (FR Germanio) kaj gefratoj **Sara kaj Kim Jones** (Usono) surprizis per sia seriozeco, sed... mankis reĝisora mano por el tiu kaoso krei ĝuindan programon. Multaj tamen ĝuis ĝin, onidire.

Internacia Arta Vespero: Ĝi estis altnivela kaj longa, preskaŭ trihora koncerto, teknike flua, sed ankoraŭ malproksima de modeleco. Preskaŭ ĉiuj artistoj, kiuj jam koncertis tra la semajno, ripete aperis ankaŭ en ĉi tiu programo (Kostova-Toteva, Zborowska, Damjanov, Tzaut), plejofte kun la jam aŭditaj programeroj.



Veselin Damjanov (supre), Jadwiga Gibczyńska (maldekstre) kaj Bożena Zborowska

Tio montris, ke en pluraj kazoj la antaŭaj solkoncertoj estis superflujaj kaj rolis kvazaŭ provludoj por ĉi tiu programo. La plej bonan parton de la programo ni ŝuldas al eksterordinare bona gimnazia **koruso el Islando**, kiu troviĝis en Lucerno pro la menciita muzika festivalo kaj konsentis gasti ankaŭ en la kongresa programo. Ni malofte aŭdas korusojn en UKoj kaj tial estis vera ĝuo kaj plena novaĵo konatiĝi kun la fajna arto de la islandaj gejunuloj. Pluraj el iliaj kantoj estis en Esperanto. **Vesna Stefanović** (Jugoslavio) montriĝis virtuoza violonistino. **Danielle Béguin** faris novan surprizon per komuna pianludado kun 14-jara franca kongresanino. **Olivier Tzaut**, kiu laŭ la naturo de sia arto ne estus devinta aperi en ĉi tiu programo, trovis multan aklamon ĉe la publiko. Ne mirinde, ĉar li estas kompetenta interpretanto de la folkloro kaj leĝera muziko, posedas karesan voĉon, uzas nur unuarangajn tekstojn kaj plene regas la arton de publika prezentado. Komence de la Vespero, **Jadwiga Gibczyńska** (Pollando) majstre, sed longe kaj nekonvene por la resto de la programo, prezentis monologon "Post vizito" de Vesna Skaljer-Race.

Kelkaj artistoj (Kostova-Toteva, Stefanović kaj parte ankaŭ Zborowska) apenaŭ scipovis Esperanton. Oni devus atenti tion, kiam oni varbas partoprenon de artistoj en niaj Kongresoj.

Teatro: Kiel jam plurfoje dirite, la Movado spertas nekutiman furoron de la teatra, ĉefe amatora, arto. Grupoj kaj trupoj aperas kiel postpluvaj fungoj. Al la jam tradicihavaj profesiaj aŭ duonprofesiaj grupoj en Bulgario, Pollando kaj Jugoslavio aldoniĝas lastatempe tiuj en Francio, Svislando, Brazilo, Soveta Unio, Hungario, Finnlando, Britio, Hispanio, Aŭstralio. Ni do estus devintaj sperti ankaŭ kvalitan ŝanĝon en Lucerno, sed tio ne okazis. La ĉefa kongresa teatraĵo — *Amo* de Paul Géraudy — portis al ni nenion novan, nenion valoran, krom unu plian lecionon kiel ne fari la kongresajn teatraĵojn. Ne temis pri aktoroj, precipe ne pri **Belka Beleva** kaj **Anani Anev**, la ĉefrolantoj. Ili denove pruvis, ke ilia aktora arto estas atentinda kaj plurloke fajna kaj plene ellaborita. Ankaŭ **Veselin Damjanov** pozitive surprizis per siaj aktoraj kvalitoj. Tamen, bonaj aktoroj ne sukcesis krei bonan teatron prezentajn. Mankis al ĝi taŭga ritmo, pli moderna reĝisora koncepto kaj — antaŭ ĉio kaj denove — taŭga salono kaj pli komprenema publiko. Pro Talia kaj aliaj teatraj muzoj kaj dioj, oni ne havu kongresan teatraĵon kiam ne eblas ludi ĝin sur adekvata scenejo! Ni ne plu insultu tiun parton de la kongresa publiko, kiu komprenas la teatron. Kaj tiu alia parto de la publiko, kiu venas nur por kompletigi sian kolekton de lumbildoj, kiu en Lucerno nur dum la dua prezento de la teatraĵo sukcesis rekordi per 168 eliroj kaj 39 eniroj en la salonon, ili simple ne venu al la teatraĵo. Ĉu ili eble kredas, ke tio estas deviga? Krome, la ĉi-jara elekto de la teatraĵo mem estis malĝusta. Géraudy estis avangarda antaŭ duona jarcento.

La alia teatra programparto venis en Lucerno de **Jadwiga Gibczyńska** (Pollando), fajna kaj gracia artisto, eble la plej bona aktorino, kiu dum la lasta jardeko aperis sur niaj scenejoj. Ankaŭ ŝi suferis pro la salona maltaŭgeco kaj pro tiu diabla mikrofono por la monologo en la Internacia Arta Vespero. Tamen, ŝia *Majnimfo* (de B. Leśmian) estis majstra, eĉ spite al ŝajna tradukolamo kelkloka. Estis interese revidi Gibczyńska ankaŭ en *Marie Curie*, ŝia propra teatra omaĝo al la granda fizikistino (jam prezentita en Kopenhago en 1975). Ŝi aperis ankaŭ kiel deklamanto de premiitaĵoj en la kunveno de Belartaj Konkursoj. Kvarfoja sceneja apero en la malfacilaj kongresaj kondiĉoj estas tro. Ni ne ekspluatu la artistojn tiel multe.

La Kongresoj (aŭ UEA) suferas pro manko de teatra (kaj aliarta) politiko. Ni ŝajne ne scias, kion ni volas, ni ne orientiĝas en la alfluanta movada teatra tajdo, ni ne scias kio tie meritas subtenon, ni peke dormas dum la movada teatro viglas. Pli da informiteco, pli da sistemeco en la flegado de la arto, por doni al la Kongresoj teatraĵojn, kiujn ili meritas, kaj por doni al la teatroj la scenejon, kiun ili meritas — la kongresan.

Hill/Masterman/Milojević


Asteriksa kongreso de TEJO

Niajn nejunularajn legantojn povus konfuzi la sekva raporto. Ĝi impresas pli multe kiel recenzo pri "Asteriks", ol kiel raporto pri TEJO-kongreso. Sen malgravigi la rolojn, kiujn en la 35a IJK ludis Asteriks kaj Kompanio, ni emfazu kelkajn aliajn faktojn: La Kongreso okazis sub la alta protekto de s-ino M.H.M.F. Gardeniers-Berendsen, nederlanda ministro pri kulturo, sporto kaj sociala laboro; la Kongresa libro (sur recikligita papero) ampleksis 40 paĝojn; tuta kajero de "Kontakto" (n-ro 2/79) dediĉiĝis al la kongresa ĉeftemo kaj distribuiĝis al ĉiuj kongresanoj; gazetara servo funkciis elstare (en kvin lingvoj) kaj rezultigis dekon da artikoloj kaj duonhoran radioprogramon. Spite al la plendoj fine de la sekva raporto, statistikemulo listigis 1 196 ĉeestojn en diversaj studrondoj, diskutgrupoj, kursoj kaj aliaj laboraranĝoj de la 35a IJK.

OBELIKS, **Miraklomiks**, **Moŝtiks**, tio estas roluloj en la bildstrio *Asteriks la gaŭlo*, lastatempe aperinta en Esperanto. Sed ankaŭ nomoj de diversaj salonoj en la arbara domaro de la 35a Internacia Junulara Kongreso, kiu kunvenigis 317 gejunulojn el 30 landoj en Austerlitz, Nederlando, inter la 20a kaj la 27a de julio. Fakte, tra la kongresa semajno la laborojn partoprenis pliaj dekoj da gejunuloj kaj oni do povas paroli pri pli ol 350 partoprenintoj en IJK. En 1978, numero de *Kontakto* enfokusigis la fenomenon IJK per detala pri-skribo de la 34a en Veliko Tarnovo. Tiel funda trakto ĉi tie maleblas, kaj mi provos kapti nur la esencan etoson de la ĉefa kultura evento de la TEJO-jaro.

Miraklomiks: miksi ideojn por fari finraportan eliksiron. Miraklomiks, la druido kolektas herbojn, miksas, kribras, rafinas por produkti sian mirindan magiaĵon. En la salono Miraklomiks bolis alia kaldrono: prestiĝa seminario organizita de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO (KER) kaj financita helpe de la Eŭropa Junulara Fonduso kaj Unesko. Partoprenantoj diskutis la temon "Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?". Prelegis Humphrey Tonkin (prezidanto de UEA), John Catling (funkciulo de Eŭropa Ekonomia Komunumo), Peter Kuenstler (altranga funkciulo de UN en Ĝenevo), Richard Corbett (ĝenerala sekretario de Eŭropa Kunordiga Buroo por Internaciaj Junularaj Organizaĵoj) kaj Akiko Woessink-Nagata (redaktorino de *UN kaj ni*). Kuenstler kaj Corbett venis speciale por kontribui al la seminario, kio montras la prestiĝon de TEJO ĉe ne-esperantaj instancoj. Tio ŝuldiĝas grandparte al la unujara laborado de Ian Tarrant, kiu nun forlasas la KER-oficejon por du jarojn labori en Kenjo.

Prepari la miraklomiksan eliksiron ne okupas longan tempon. Espereble ankaŭ la fina raporto pri la seminario (en pluraj lingvoj) baldaŭ aperos. Ĝi resumos la 5 prelegojn, plurajn aŭdvidajn prezentojn, rezultojn de 5 studgrupoj (gvidis: Lennartz, Grundström, Tsiturides, De Wit kaj Puig) kaj tagojn da funda diskutado. Tiu ĉi seminario iniciatis novan intereson ĉe junaj esperantistoj pri problemoj ekster la Movado, kaj ĝi emfazas la bezonatan fortiĝon de TEJO sur la eksterarilata tereno. Sed necesos multe pli da intereso ol montriĝis en Austerlitz. Kvindeko da kongresanoj inde traktis la temon, sed ŝteliris en la kapon de pli ol unu homo la demando "Kie sin kaŝadas la ceteraj 300 anoj ĝuste je la prelega horo?"



Moŝtiks: gvidi internacian organizaĵon pli malsimplas ol estri tribon de gaŭloj. Kutime, la Komitato de TEJO kunsidis plurhore en ĉiu tago, kaj konvenis ke ĝi laboru en la salono Moŝtiks, nomita laŭ la ĉefo de la asteriksa klano. La Komitato okupis aktivulojn, kaj dum ĝiaj kunsidoj la seminario — fakte la tuta Kongreso — iom suferis pro manko de spertaj fluparoluloj. Sed apenaŭ malpli suferis la mankontoj mem: kaptiĝo en komitata kunsido povas esti foje interesa, pli ofte teda. Eble meritas esploron, ĉu tion kaŭzas malĝusta sinteno de la komitatanoj, ĉu netaŭga proceduro.

Se vi deziras detale sciigi pri la laboro de la Komitato, petu protokolon de la ĝenerala sekretario. Ĉi tie ni elektas nur du erojn por aparta mencio: Unue, la norvegoj akceptiĝis kiel nova (32a) landa sekcio, alportante malgrandan membraron sed refreŝigan entuziasmon kaj junajn agemulojn. Due, elektiĝis la nova Estraro (v. ĉi-apude), kiu oficos (laŭ la nova Statuto) dum 2 jaroj. Savas Tsiturides forlasis la Estraron post memorinda prezidanteco, kaj agnoske de liaj grandaj servoj al TEJO oni elektis lin honora prezidanto. Alia


eksa estrarano, Floreal Gabalda, elektiĝis kiel honora membro, pro agado en Latin-Ameriko.

"Varbato" logis 70 kongresanojn eniri kvin grupojn por diskuti, kiel altiri gejunulojn al Esperanto. Aperis fine de la IJK stencilita resumo de la 3-hora diskuto. Konkurson "Varbilo de la Jaro" partoprenis 37 konkursaĵoj, kiuj estis ekspoziciitaj. La ĉeestantoj aljuĝis premion al Serge Sire (Francio), pro propagande farbita aŭtomobilo.

Obeliks: Nenio eblus sen Obeliks, ĉu en Gaŭlujo, ĉu en Aŭsterlico. Obeliks, la fortega batalanto de la gaŭloj, ne ĝeniĝas glutante plurajn aprojn. Ĉambro Obeliks havis lokon por pli ol nur pluraj kongresanoj, sed bedaŭrinde ĝi ne estis sufiĉe granda por ĉiuj. Tamen troviĝis scenejo, agrabla teraso, kaj — ĉu plej grave? — trinkejo, kaj en Obeliks sin disvolvis la kultura, distra flanko de la IJK. Nederlanda muzikgrupo "La pirarbo" regalis per bona prezento de nederlandaj popolaj kantoj kaj dancoj, en kiuj partoprenis ankaŭ la dancemaj spektantoj. *Literatura foiro* refoje aljuĝis la premion "Verko de la Jaro": ĉi-okaze al *La granda kaldrono* de John Francis, pri kies elekto ŝajnis regi ĝenerala kontento, kvankam

don da rolantoj, kun vizaĝoj debutaj inter la konataj. Sed, ĉu la internacieco estis malekvilibra pro longa scenejakaparo fare de la francoj? Se jes, tamen oni devas agnoski admire ilian kulturen kontribuon. En tre malfacilaj kondiĉoj (malvarma pluveta vetero en subĉiela teatro) la pariza Esperanto-teatro TESPA surscenis *La fatomaŝino* de Cocteau. Tiu teatraĵo, artisme aktorita, postulis multe da antaŭpreparo. TESPA realigis por la IJK programon vere atentindan; se ne sufiĉe atentitan, kulpas pri tio la vetero. Pli bonvetera estis la ekskurso, kiu kondukis al bela urbeto kaj malnovaj muelejoj, sed ankaŭ al granda ekspozicia parko pri agrikulturo, kie vagado estis agrabla, kvankam nederlandlingvaj indikoj malmulton komunikis. Sur digo, ambaŭflankata de la maro, evidentis la leciono pri la nederlandaj atingoj en la batalo inter la maro kaj tero.

Oni memoros la 35an IJK pro la glata organizo kaj impone ampleksa programo (oni povis sporti, aktori, muziki, popoldanci, perfektigi sian Esperanton, eklerni la nederlandan lingvon). La landa kongresa komitato vere meritas gratulon. En kongreso plendoj ne-



ne ĉiuj opiniis taŭga la prezentmanieron de tiu Literatura Vespere. Bona, kvankam iom tro longa, filmvespero informis pri Nederlando. Fakte, filmoj abundis en la programo. La Internacia Vespere arigis buntan ban-

eviteblas. Sed aŭdiĝis eĉ ne unu plendo pri programa magro. Pri kio do la plendoj ĉi-foje? Nu, ni subaŭskultis plurajn... kaj temis pri programa troo. Ja ne eblas plaĉi al ĉiuj! Eventuale necesas pli klare difini la celojn de IJK. Ĉu unuavice oni celas ampleksan programon por montri eksteren la viglon de TEJO? Aŭ, ĉu IJK estas unuavice interna evento, kie ebleco babili libere kun amikoj pli gravas ol abundaj filmprezentoj, prelegoj kaj organizitaj eroj? Necesas ankaŭ pripensi la sekvojn de la kresko de partoprenantaro de la IJKoj. En Austerlitz la ejoj ne tute taŭgis. Pro ilia diseco foje ŝajnis ke temas pri tri kongresetoj okazantaj en tri apartaj lokoj. Granda kongreso povas perdi koheron, se oni ne zorge elektas la ejojn. LKK ĉi-foje estis viktimo de sia elekto, sed spite ĉiujn malfacilaĵojn ĝi realigis kongreson science planitan kaj detale plenumitan. Dank' al la laboroj de la seminario kaj ties efiko ĉe la eksteraj instancoj, la tuta 35a IJK grave kontribuas al plua progreso de TEJO.

Ian Jackson

(helpe de: Alain Dawson, Frans Stein kaj Ite Tytgat)

NOVA ESTRARO DE TEJO

Prezidanto: Stefan MacGill, Nov-Zelando/Nederlando (kunordigo, rilatoj kun UEA)

Vicprezidanto: Brunetto Casini, Italio (financoj, membrovarbado, edukado de gvidantoj, fakaj asocioj)

Vicprezidanto: Csaba Lendvay, Hungario (eksteraj rilatoj)

Ĝenerala sekretario: Thomas Bormann, FR Germanio

Estrarano: Ian Jackson, Britio (eldonaĵoj, Pasporta Servo)

Estrarano: Michael Lennartz, Germana DR (edukado, landaj sekcioj)

Estrarano: Zdravka Metz, Jugoslavio (regiona agado)

Estrarano: Bob Venhuizen, Nederlando (kongresoj)

Estrarano: Amri Wandel, Israelo (ekstera varbado)



Kongreseroj...

Karina el Svislando

La supran bildon ni ne aperigas pro Kurt Greutert (maldekstre) kaj Torben Kehlet apud li, sed pro la filino de tiu lasta, kies frizuro aperas en la dekstra suba angulo de la foto. Ŝi, kun siaj kvin jaroj kaj dana kaj germana gepatroj, loĝante en Belgio, denaske parolante Esperanton, bele konfuziĝis en la Inaŭguro kaj laŭte deklaris, ke ŝi estas "el Svislando". Nun eble Greutert montras al la patro Kehlet — malantaŭ kiu svisa monto naskiĝis lia filino.

Unu laca verda tuko

Kiam oni kongresas en malgranda urbo kiel Lucerno (75 000 loĝantoj), tiam granda kongreso, kiel la nia, devus esti ĉiupaŝe rimarkebla. En Lucerno tio eventuale okazis pro la inundo de Esperantaj vortoj en restoracioj, vendejoj, ekskursejoj ktp., sed ne pro la kutimaj surstrataj signoj, kiel flagoj, sloganoj k.s. Pendis tie — en la stacidomo — unu (jes ja bela) tola slogano kun la nomo de la Kongreso. Krome, antaŭ la kongresejo lace flirtis unu sola verda flago, malgraŭ la fakto, ke la Centra Oficejo en Roterdamo stokas plurajn dekojn da kongresaj flagoj kaj flagegoj diversspecaj.

La (alia) granda kaldrono

Ne temas ĉi tie pri la ĉefverko de John Francis, kiu en la TEJO-kongreso (vidu p. 159) gajnis la titolon de la verko de la jaro. La granda kaldrono de Lucerno estis la salonoj "Forel" kaj "Saussure" en la kelo de la kongreseja domo. Aŭ, ĉu ni konsideru, ke estis aparta lukso havi tiun saŭnon je la dispono de la kongresanoj? Ĉiukaze, gratulon al tiuj, kiuj sukcesis elteni siajn kunvenojn en tiuj du lucernaj ŝvitejoj!

Inflacio de honoraj prezidantoj

Aliloke en ĉi tiu numero vi povas legi, ke TEJO nun havas unu plian honoran prezidanton. Ni, kompreneble, ne volus miksiĝi en la internajn aferojn kaj honorojn de TEJO. Ni volas nur memorigi, ke la junulara sekcio de UEA nun havas sep honorajn prezidantojn, kiom UEA mem sukcesis kolekti en sia tuta 70-jara historio. En TEJO estas pli facile fariĝi honora prezidanto, ol honora membro. Tial de tiu lasta speco ekzistas nur du specimenoj.



Ĉu nova transpago-ebleco?

Bonŝanca *Heroldo de Esperanto*, kiu havas redaktorinon, kiu (vidu la supran foton) pretas akcepti abonpagon en kisoj. Por nia revuo tiu transpaga ebleco ne ekzistas, ĉar ne ni pretus kisi la kalvan redaktoron.



Neplenumita deziro

Kiam ni post la Kongreso montris ĉi tiun foton al la prezidanto de UEA, li kun envio gapis al ĝi kaj demandis, ĉu la fama svisa Esperanto-Balono efektive flugis kaj flugigis kongresanojn. Li konfesis, ke tio estis ankaŭ lia arda deziro, kiu ne realiĝis. Nu, oni ne povas trakti la novan statuton kaj plenumi siajn balonflugajn revojn.

Unua helpo ĝis propra elĉerpiteco

Inter la plej diligentaj kongresanoj estis Anna Gerber (Svislando), kiu deĵoris en la kongreseja ĉambreto por la unua medicina helpo. Ŝi havis pli ol sepdek pacientojn. Bedaŭrinde, mankas spaco por escepte gaja listo de la diagnozoj kaj helpopetoj.



Ĉi tiu mirinda foto de Zdravko Nikolov povus nomiĝi "Tri kongresaninoj". Ĝi preskaŭ meritis famigon de "Tri fratinoj" de Ĉeĥov aŭ de "Tri musketeroj" de Dumas (patro). Klaras, ke Esperanto havas kaj historion kaj estontecon!

Anoncetoj

Naturistoj/nudistoj, ankaŭ en netranspagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn ĉe: H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Kio estas la kurzo por la Stelo? La respondo vi trovos en la Bulteno de Universala Ligo.

Informiĝu objektivite pri la optimale modernigita ortografio de Esperanto! — OEO, 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse, Francio.

Ĉu vi kredas ke vi povas konstrui vian estontecon? Serĉas pli bonan laboron? Deziras interŝanĝi produktivajn ideojn por mono? Skribu al: Klubo de la Inventistoj, Box 607, Saipan Mariana Islands 96950, Usono.

13-jara komencantino deziras letergeamikojn tutmonde: Cecilia Sjögren, Johannelundsvägen 31, S-16359 Spånga, Svedujo.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio aŭ Greklando, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

Esperantaj Francaj Eldonoj:

Verkoj de L.L. Zamenhof

Fundamento de Esperanto, kun aldonoj kaj klarigoj. Bindita 13,20 gld., bruŝurita 10,80 gld., 355 paĝoj.

Lingvaj respondoj. 144p. Bind. 10,50; broŝ. 8,40 gld.

Marta de E. Orzeszko, trad. de L.L. Zamenhof. 213 paĝoj, ilustrita, bindita. 10,80 gld.

Hamleto de Ŝekspiro, traduko de L.L. Zamenhof. 206p. Ilustrita, bindita. 9,60 gld.

De la sama eldonejo: **Gvidlibro tra Paris**, de Julieta. 249 paĝoj, kun fotoj kaj urboplanoj; 8,70 gld. **La kunprinclando Andoro**, de Bacquer. 60 fotoj, 73p.; 6,00 gld. **Sen eliro; La respektema p...**, de Sartre, trad. Roger Bernard. 111p. 5,70 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/7

La politiko, dum ĝi ankoraŭ ne estas malsovaĝigita de la superdemokratio, estas la reĝino inter la diversaj specoj de la rabarto. La historio politika estas la krimromano plej riĉa je abomenaj murdoj kaj, krome, je plej perfidaj intrigoj. Kvankam kovrita kutime per ora masko, la arto forrabi tronojn kaj politikajn gregojn estas kulmino de malnobleco. Vere, dum la rabartoj surmara, surstrata, kontraŭbanka k.c. produktas ĉefe nur hazardajn unuopajn viktimojn, la politika produktas ilin amase, lavange.


♦ Esp/8

Laŭ la racio kaj laŭ la postuloj de nobla koro, ĉiu ajn homo respondecas pri ĉiu ajn sia frato en la Homaro. La malkovro de ĝenerala interdependeco nuligas ĉiun, ofte sovaĝan, aŭtokratan pretendon, ĉu ekonomian, ĉu socian, ĉu politikan. Ĝi tamen limiĝas al la rolo disvolvata de unuopulo en la monda orkestro. Laŭ la superdemokratio la sama respondecas, aposteriora, rilatas ankaŭ ĉiun entreprenon kaj ĉiun landon. Sekve de tio, ke en tiuj organizaĵoj la decidpovo kuŝas ĉe malmultaj homoj, nur ili


mem estas aŭ la meritplenuloj aŭ la krimuloj produktantaj viktimojn, proporcie al la amaso de mono kaj/aŭ de homoj, kiun ili manipulas.

♦ Esp/9

Ĉiu ajn klopodo por bremsi, malpermesi aŭ bloki la transiron de la ĝisnuna sovaĝa sistemo al malsovaĝigita (superdemokratia) estas alta krimo de la unuopulo kontraŭ la tuta Homaro. Ne senkulpigas la fakto, ke ankaŭ la plejmulto tiel misagas. Nek tio, ke la unuopulo havas malan opinion, tiel rifuzante rekoni sian tiufakan laikecon. Nek tio, ke oni agas nur malrekte aŭ kaŝe. La respondecas socia estas strikte de la unuopa homo, kiam tiu libere elektas sian konduton. Produktado de viktimoj, en kiu oni libervole partoprenas, kondamnas senpere la partoprenanton.



MONDHARMONIKA INSTITUTO
VIA SPORT 18
I-40065 PIANORO, ITALIO



Dum preskaŭ duonjarcento, la originala poezio de Kalocsay reprezentigis esence nur per *Streĉita kordo*. Nun, fine, *Izolo* prenas sian lokon apud ĝi. La unua eldono de *Izolo* fariĝis praktike kvinekzemplera, pro la militeksplodo en 1939. Ĉi tiu fotorepreso estas farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj.

Eldonis UEA, Rotterdam, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Ned. 17,16) gld. + afranko 10%.

ABZ de amo estas havinda popularscienca verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.


Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledoimita plasto. ISBN 87 87089 09 2.

Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj. Por samtempa mendo de minimume 3 ekz., UEA donas 33-procentan rabaton.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

NOBELPREMIO 1974

Unu el la majstroverkoj de nia tempo



Nun en esperanto!

Serio Oriento-Okcidento de UEA

Tradukis William Auld
kaj Bertil Nilsson

"Per Aniario Harry Martinson, dank' al sia speciala talento – fantazio same altgrade de inĝeniero kaj poeto – fariĝis bardo antaŭ ĉiuj aliaj de la atomepoko." Karl Söderberg

Prezo: **58** sv kr
(En Svedujo 70 kun imposto)

Mendu tuj ĉe
ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Fack, 200 42 Malmö
Poŝtgiro 578-5
aŭ ĉe via libroservo